

Bulgara Esperantisto

Oktobro 1988



ENHAVO

- 1 Al pli da iniciatemo! (Nikola Aleksiev)
- 3 El la arkivo de Bulgara E-Muzeo
- 5 21-a Konsultiĝo de E-Asocioj de socialismaj landoj (Dimităr Papazov)
- 6 Enlanda movado: Ni bezonas praktikan laboron! (Radoslav Paraŝkevoj)
- 9 III Turistaj Esperanto-Tagoj en Sofio
- 12 Pri la naturo de Zamenhofa mondkoncepto (1876—79) (Canko Murgin)
- 15 Nia intervjuo (Georgi Miĥalkov)
- 16 Lingvaj demandoj (A. Vaitilavičius, Violin Oljanov)
- 19 Sincera amiko de nia lando (Ĥristo Gorov)
- 21 Afrikaj esperantistoj en Bulgario (Cvetka Miteva)
- 23 Juna centjarulo impetas al la estonto (Atanas Ilkov)
- 25 Ni recenzas (Dimităr Haĝiev)
- 26 Heroaĵo sub bulgara nacia flago (Bojko Krăstevič)
- 28 100 tagojn en Bulgario (Dang Dinh Dam)
- 32 Deziras korespondi
- IV Distra paĝo

REDAKTA KOMITATO

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redakta Komitato: Atanas ILKOV (redaktoro), Dimităr HAĜIEV, Georgi MIĤALKOV, Krăstju KARUCIN, Kunčo VÁLEV, Libertaria MLADENOVA, Lidia RAEVA (respondeca sekretario), Mariana ELENOVA, Radoslav PARAŜKEVOV, Nikola NIKOLOV, doc. Stojčo STOJĈEV, Venelin MITEV

Pentristo: Penka PETKOVA

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Nikola NIKOLOV

Adreso de la redakcio: bul. „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio, Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Eldonkvanto: 6500 ekz.

Materialoj por la koncerna numero de „BE“ estas akceptataj ĝis la 10-a de la kuranta monato — du monatoj antaŭe. La redakcio aperigas nur bonkvalitajn fotojn.

En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla nur per la poŝto. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj.

Estas organizita regula registrado de la revuo sur magneto-fonbendo por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

SUR LA UNUA KOVRILPAĜO:

La Sofia Universitato festas sian 100-jaran jubileon. Multaj eminentaj bulgaraj esperantistoj estas ĝiaj edukitoj. Tie ĉi en 1963 okazis la 48-a Universala Kongreso de Esperanto. En la sama jaro en ĝi komenciĝis fakultativa instruado de Esperanto.

GRAVA SCIIGO DE LA REDAKCIO

Lastatempe la redakcion alvenis leteroj de abonantoj el Bulgario kaj el eksterlando, kiuj plendas, ke ne ricevas la revuon. S-ni Nikola Nikolov, kiu transprenis la administradon de la revuo de S-ni Asen Josifov ekde julio k. j., intense laboras, por ke la administrado de „Bulgara Esperantisto“ funkcii normale kaj senprokraste. Abonantoj, kiuj ne ricevis jam aperintajn kajerojn de „BE“, bonvolu tuj informi la redakcion nepre sciigante kiamaniere ili abonis la revuon.

Ni avertas la bulgarajn geesperantistojn, ke ekde nun ili povos aboni „Bulgaran Esperantiston“ nur per la lokaj poŝtejoj, dum la organizita ĉiujare abonkampanjo. Per la kancelario de Bulgara Esperantista Asocio, post la abonkampanjo, povas aboni grupe la revuon nur partoprenantoj en la unuagradaj Esperanto-kursoj.

La riĉenhava revuo „Bulgara Esperantisto“ estas unu el la plej malnovaj en Esperantio. Se vi deziras regule ricevi ĝin, senprokraste reabonu. Nur tio garantias al vi la plezuron regule legi „Bulgaran Esperantiston“.

Ni konsilas al niaj abonantoj fari al siaj korespondantoj belan kaj interesan donacon — jarabono de revuo „Bulgara Esperantisto“. La bulgaraj gesamideanoj povas fari tion per kiu ajn poŝtejo en la lando.

Jaro 57
N-ro 10

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

AL PLI DA INICIATEMO!

Nikola ALEKSIEV,
veterana esperantisto

Ni vivas en tempo, kiam necesas organizi la socialan vivon en nia lando en la spirito de rekonstruo, utiligante ĉefe la meminiciativon, la memregadon, la aktivigon de ĉiuj societaj membroj per kolektivaj labormetodoj. Tio tute ne signifas, ke oni devas eviti la personan respondecon, kaŝi sin malantaŭ la tiel nomata „kolektiva senrespondeco“.

Tio entute rilatas ankaŭ la esperantistajn societojn, kiuj dum la lastaj du jardekoj al kutimiĝis altgrade atendi direktivojn pri sia agado de sia distrikta estraro aŭ de la Centra Estraro de BEA. Tiu atendado influis negative multajn societajn estrarojn. Estas ege necese likvidi similan praktikon de atendado kaj suflorado „de supre“. Oni decide foriru de similaj labormetodoj.

Nun estas rekomendinde cerbumi persone kiamaniere organizi la societan vivon kaj agadon. Se tamen iu tasko havas tutlandan karakteron, natu-

re la Centra Estraro de BEA okupiĝos pri ĝi (ekz. presado de lernolibroj, vortaroj, diversaj diplomoj, organizado de tutlandaj aŭ internaciaj aranĝoj kaj fiksado de partoprenkondiĉoj k. s.). Eĉ, se necese oni povas ankaŭ „elsube“ flustri aŭ konsili al la Centra Estraro pri similaj aranĝoj, kiuj ne estas laŭ la eblecoj de apartaj societoj kaj postulas centran iniciaton.

Krome, oni ne devas elĵeti el la „barko“ ĉion, kio ĝis nun bone helpis normalan societan agadon. Se iuj ĝisnunaj metodoj kaj formoj de laboro evidentiĝis utilaj, oni uzi ilin ankaŭ estonte. Nature, se necesas, oni povus ilin refreŝigi aŭ korekti konforme al la novaj cirkonstancoj. Paralele oni povas kaj devas serĉi novajn nestandartajn laborformojn, kiuj povus bone servi en nia hodiaŭa kaj estonta agado.

Ni ne forgesu, ke la bulgara esperantista movado estas riĉa je meminiciataj tradicioj. Dum jardekoj la espe-

rantistoj en nia lando, kiel ankaŭ la esperantistaro alilande, kalkulis nur je siaj propraj fortoj kaj rimedoj, sed tamen ne krucis la brakojn kaj entuziasme agadis. Oni diras: nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Tiu filozofio kondukas al plej gravaj eraroj en la socia vivo: pasiveco, malagado, manko de iniciatemo. Similaj „seneraraj“ gvidpersonoj nur povas bremsi la societan agadon. Oni eĉ ne timu fari iun eraron. Post argumentita kritiko la eraroj estas eviteblaj. Estas malnova problemo: „Unu venkita generalo valoras pli ol dek generaloj, kiuj ne estis venkitaj nur pro tio, ke ili simple ne partoprenis iun ajn batalon“, do — al ili mankas ia ajn sperto.

La pli malnovaj esperantistaj generacioj konas tion el propra sperto. Ili bone memoras kiel entuziasme laboris societaj estraroj kaj la membraro por kolektado de membrokotizoj aŭ abonoj al la asocia organo, por preparo de lekcioj, propagandaj prelegoj, organizado de kursoj, havigo de lerniloj kaj kursejoj ktp. La veteranoj devas konigi tiun sperton al la pli novaj esperantistaj generacioj, utiligi tiun sperton ankaŭ sub la novaj kondiĉoj. Tio sendube sukcesigos la societan agadon hodiaŭ kaj morgaŭ.

Estus utile kontroli per la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ kion entreprenas aliaj komunumaj Esperanto-societoj kaj „pruntepreni“ el ties sperto iujn utilajn aŭ nekonatajn iniciatojn kaj aranĝojn. La prunteprenado ne devas esti mekanika: oni pripensu kree kiel apliki tiun sper-

ton, eĉ pliriĉigante kaj disvolvante ĝin. Krome, oni povus interrilati kun iu/j najbara/j societo/j por entrepreni komunan aranĝon, eĉ en regiona skalo: ekz. sudbulgaran Esperanto-renkontiĝon, apudmaran Esperanto-feston, feston de la bulgara rozo, komunan ekskurson k.s. Estas malfacile nombri ĉiujn eblecojn tiurilate. Ni rememoru la saĝajn vortojn de la eminenta germana klasikulo Goethe: „La arbo de la vivo estas ĉiam pli freŝa ol kiu ajn griza teorio“. La vivo mem estas pli riĉa je sugestoj ol ajn aŭtoro de instrukcioj... Oni ne timu realigi eĉ iniciaton, kiu unuavide aspektas ne-realigebla. En la bolado de pensoj, proponoj, provoj naskiĝas ĉiam novaj kaj novaj iniciatoj.

Kompreneble, por la realigo de iuj aranĝoj estas necesaj ankaŭ monrimedoj. La plimulto de niaj societoj ne disponas pri sufiĉaj monrimedoj (escepte de tiuj, kiuj sukcesis organizi produktadon de varoj por amasa utiligo). Tial estas necese serĉi eblecojn por senrimeda realigado de iuj aranĝoj (recitado, kantado, surscenigo de iuj dialogoj k.s. sen pago de honorario), aŭ kooperadon kun aliaj organizaĵoj (publikaj legejoj, organizaĵoj de Patrolanda Fronto, porpacaj societoj, kulturdomoj aŭ kluboj...) por realigo de komunaj kunvenoj, prezentoj, festotagoj k.s., kiujn ili povus finance subteni. Oni povus ankaŭ organizi laborhorojn (ekz. sabate aŭ dimanĉe), kies enspezo estu je dispono de la societo. Malfacilaĵoj, nature ne mankos, sed ja ne ekzistas nur facilaj vojoj.

NOVA E-KULTURDOMO

La 6-an de junio k. j. okazis solena kunveno de esperantistoj en Stara Zagora, organizita de la urba E-societo „Verda Stelo“. Konforme al novaj konceptoj pri evoluigo de la E-movado en Stara Za-

gora kaj laŭ propono de CE de BEA, en la urbo estis fondita Esperantista Kulturdomo kaj estis elektita ĝia estraro.

Ĉeestis Ivan Ĉulev, membro de CE de BEA. Kaj

la sekretarioj de E-domoj en Plavdiv, Pleven kaj Burgas. Ili proponis al la nova E-kulturdomo interŝanĝon de sperto.

Georgi NASTEV

Estimataj legantoj,

Dank' al la intima kunlaborado inter nia redakcio kaj la E-muzeo ĉe BEA naskiĝis la supra rubriko. En ĝi ni intencas publikigi interesajn kaj unukajn dokumentojn. Ili ne nur pruvas la riĉan historion de la bulgara esperantista movado, sed sciigas al niaj novaj kaj pli junaj E-generacioj pri eventoj kaj homoj lasintaj profundan spuron en internacia kaj bulgara Esperanto-vivo.

„BE“

Letero de Ivan Krestanov al Radoslav Triĉkov

Sofia, la 30.VI.63

Kara samideano Triĉkov,

Kvankam iom malfrue, pro troa okupateco, tamen despli kore mi dankas vin pro via agabla respondo datita la 14.V.63. Mi ĝojas ankaŭ, ke vi „obadiĝis“¹ en la vegetara restoracio en Sofia kaj ankoraŭ pli ĝojus, se vi estus vizitinta min hejmen. Mi ja loĝas en la „baŝcentro“² de la ĉefurbo! Tie ni povus pli longe interparoli kaj vi estu vidinta kelkajn el la vin interesanta historio de nia esp. movado en Vraca, kie mi multajn jarojn vivis, lernis kaj propa-

gandis, ĝojante, ke nun tie Esperanto jam fruktas.

Vi petas min skribi al vi pri mia restado en Vraca. Jen rapidece:

En Vraca mi studis en la popola lernejo³ „Kuzman Triĉkov“ 1899—1901 la III kaj IV klasojn kaj poste en la progimnazio (klaslernejo) „Knjaz Boris“ la I, II kaj III klasojn, 1901—1904. La regimento⁴ de mia patro estis transigita en la urbo Orhanie (nun Botevgrad) kaj ĉar tie ne estis ankoraŭ alta lernejo (gimnazio), mi estis devigita lerni metion ĉe serurista majstro. Dum dek monatoj laborante fornojn, veturilojn, draŝmaŝinojn, pesilojn ktp. mi ofte révis pri la lernejo, kie mi tre ŝatis lingvoscien-

con kaj geografion, kie miaj kajeroj de bulgara kaj de franca lingvoj konstante „vojaĝis“ inter la kunlernantoj, kaj miaj memfaritaj koloraj geografiaj kartoj estis laŭdataj kiel modeloj de la klasinstruistoj. Mi profitis ĉiun liberan horon legante kion ajn kaj ekskursante...

Iun tagon, dum la Paska libertempo 1904, falis en miajn manojn peceto de ĉe-furba taggazeto kaj hazarde miajn okulojn haltigis tie reklamo bulgarlingva: „Lernu la internacian lingvon Esperanto, kiu malfermas al vi la tutan mondon!“ Granda estis mia deziro konatigi kun tiu mistera lingvo, sed monon mi ne havis. Iu najbaro, bozao-vendisto de albana deveno, baj Kipro Pavlov,

venis helpe al mi kaj ni havigis kontraŭ poŝtrepago da 3 levo — sumo granda por tiu epoko — la faman „Mankondukon“⁴ de G. Oreškov el Plovdiv, laŭ kiu mi eklerenis. La lingvon de d-ro Zamenhof tute allogis min, precipe ĝia reguleco kaj la interna ideo. Esperanto fariĝis mia distro kaj konscio dum la pena laborado en la serurejo. Kaj mi tiam 14-jara junulo — benis la tagon, en kiu mi trovis la ĵurnalpece-ton... Post nelonge mi skribis entuziasman leteron al ĝia aŭtoro en Varsovio kaj responde mi ricevis Adresaron kun sciigo, ke mi estas enskribita en la nomaro de la esperantistoj sub n-ro 12 607. Nepriskribebla estis mia ĝojoj. Kiu estis pli ol mi? Ho, la bela ĵuneco! Mi ŝparis ĉiun mondonaceton kaj ekkorespondis kun malproksimaj landoj kaj ekpluvis skribaĵoj kaj presaĵoj el ĉiuj randoj de la terglobo. Mi kvazaŭ ekfluigis trans maroj kaj montoj al novaj horizontoj.

Miaj gepatroj rimarkis tion kaj la venontan lernaron en septembro min sendis ree al Vraca por daŭrigi mian studadon en la tiea klaslernejo (gimnazio).

Multaj el miaj kunlernantoj en la IV klaso mokis min, ke mi perdas mian tempon kaj monon, kelkaj enviis min, malmultaj komprenis min. Sed el Saŭlo fariĝis Paŭlo. Baldaŭ mia korespondado,

nutrata per la ŝparadoj de mia manĝo kaj dormo, plifortiĝis. Alvenadis el ĉiuj kontinentoj multaj kartoĵ, leteroj, libroj kaj gazetoj, en kiuj mi jam kunlaboris. Interesiĝis miaj kunlernantoj kaj esprimis la deziron, ke mi malfermu kurson de Esperanto. Mian unuan petskribon pri tio la direktoro Krestjo Antonov rifuzis, sed min ne forlasis la espero. Ni faris novan, kovris ĝin per multaj subskriboj (pli malfrue, se mi retrovos ĝin, mi sendos al vi ties kopion) kaj frapis duan fojon sur la pordo de la direktoro. Nun, post konsiliĝo kun instruistaro, li permesis la deziran kurson, sed nur por la pli fortaj lernantoj. Kontrabande tamen vizitis ĝin ankaŭ pli malfortaj. Baldaŭ niaj instruistoj konstatis, ke plifortiĝis la intereso kaj progreso al la lingvoscienco, geografio kaj historio. Ankaŭ la francan, germanan, rusan kaj bulgaran (precipe la malnovbulgaran, kiun ni ankaŭ devige lernis) lingvojn komencis pli bone kompreni miaj kursanoj (el kiuj kelkaj pli malfrue fariĝis altoficistoj kaj eĉ ministroj), dank' al la facila kaj logika gramatiko de la internacia lingvo, kiu ilin kutimigis enrigardiĝi pli profunde kaj analizi la ideojn. Tiam ankaŭ la plej grandaj skeptikuloj certigis pri la utileco de Esperanto.

Tio sama ripetigis en VI klaso (la V-an kaj VII-an mi studis en Pleven, kie estis

translokgita la sama direktoro Krestjo Antonov, kiu tre simpatiis al ni (pacon al lia cindro!) Pri nia propagando kaj fondo de „Bulgara Esperanto-biblioteko“ sub mia redakto, pri mia korespondado kun d-ro Zamenhof el Vraca, kie mi konatiĝis kun la unua tiea esperantisto — poste fariĝinta leterportisto — Ivan Todorov Navidonski Osikovski (kun pli frua numero en la Adresaro de Zamenhof ol la mia) kaj esperantigis kelkajn el miaj profesoroj, interesigis kelkajn el niaj verkistoj kaj scienculoj, komencante de la nacia poeto Ivan Vazov kaj finante per la akademiano lingvisto Stefan Mladenov, vi povas legi en la tiama oficiala organo de Bulgara Esperantista Ligo „Lumo“, Nro 11—12/1907, pĝ. 23, Nro 2/1908, pĝ. 7 kaj 8, en „Bulgara Esperantisto“ Nro 5—6/1934, pĝ. 8 kaj 9, en „Polŝa Dnes“ (bulgarlingva eldono — Sofia, Nro 9/1960, pĝ. 16 kaj 17, miaj renkontiĝoj kun d-ro Zamenhof, kun faksimileo-propamana skribsaluto al la bulgaraj esperantistoj, kiujn li tre ŝatis k. m. a.

Al via Junulara Esperanto-kongreso⁶ en Vraca, kiun mi tre sopiras viziti, mi deziras la plej bonan kaj fruktodonan sukceson kaj premante vian dekstran manon, restas kun koraj salutoj, sincere via

IV. H. KRESTANOV

(jam 72-jara VETERANO,
sed ĉiam
ankoraŭ vigla kaj laborema)

Ivan Krestanov (28.X.1890 — 4.IX.1966), elstara bulgara esperantisto, membro de la Lingva Komitato kaj de la Akademio de Esperanto. Eldonis dudekon da libroj kaj broŝuroj, inter kiuj „Bulgara Antologio“, „La Bulgara lando kaj popolo“, duobla Esperanto-Bulgara kaj Bulgara-Esperanta vortaro. Faris centojn da propagandaj preleĝoj en Bulgario kaj eksterlande, kie li pasigis preskaŭ dudek jarojn, gvidis kursojn. Tradukis en Esperanton erojn el pli ol 30 bulgaraj verkistoj, kunlaboris al kelkdeko da esperantaj periodaĵoj. Redaktis revuon „Bulgara Esperantisto“.

Radoslav Tričkov (1899) — veterano kaj pioniro de la bulgara esperantista Movado. Lernis la lingvon en 1914. Per Esperanto pasigis jarojn en Sud-Ameriko. Fondinto en 1924 de Esperanto-societo

„Sukceso“ en u. Vraca kaj ĝia longjara prezidanto. Vizitis 8 Universalajn Kongresojn de Esperanto. Gvidis sennombrajn esperantajn kursojn tra la tuta lando, longjara ĉefdelegito de UEA en Bulgario. Honora membro de BEA kaj longjara membro de ĝia Centra Estraro.

¹ *Krestanov ŝerce uzas la bulgaran vorton „obajdam se“ (sin aŭdigi) kun esperanta finaĵo.*

² *Temas pri simila ŝerca uzo: „baŝcentro — la centro mem („baŝ“ bulgara turkdevena vorto kun signifo — mem, ĝuste, vera).*

³ *Fundamenta lernejo.*

⁴ *Lia patro oficis kiel suboficiro.*

⁵ *„Mankondukilo pri Internacia Lingvo“ Ĥr. - Popov kaj G. Oreŝkov. Plovdiv, 1900.*

⁶ *Temas pri la 19-a Kongreso de TEJO, okazinta en u. Vraca, la 28-an de julio — 3-an de aŭgusto 1963.*

21-a Konsultiĝo de E-asocioj de socialismaj landoj

Ĝi okazis en la fino de aprilo ĉi-jare en Ĉeske Budejovice (ĈSSR). La Konsultiĝon partoprenis delegitoj el Bulgario, ĈSSR (Ĉeĥa kaj Slovaka E-Asocioj), GDR, Hungario, Kubo, Pollando, Sovetunio kaj Vjetnamio. Estis pridiskutitaj demandoj lige kun la rolo de Esperanto en la komenciĝinta proceso de malarmado kaj malstreĉiĝo de la internaciaj rilatoj. Surbaze de diskutoj oni akceptis rekomendojn, kiuj tuŝas diversajn fakojn de la E-agado.

Apartan atenton oni turnis al la plua sukcesa funkciado de Konstanta Internacia Kvalifikejo (KIK), kiu celas prepari kvalifikajn E-gvidantojn je diversaj niveloj. Funkcia kiel kelkfoje en Bulgario, KIK elstaris kiel plej altnivela aranĝo de la E-asocioj el la socialismaj landoj. Komencante funkcii ekde la kuranta jaro ĉe SEA en Poprad, kun iuj ŝanĝoj en sia programo, KIK plu estos forĝejo de esperantistaj gvidkadroluj.

Unuafoje oni metis sur pli seriozan bazon ankaŭ la demandon pri la reciproka ekonomia kunlaborado en kadre de la disvolviga rekonstruo en la socio. Oni parolis pri pli fruktodona kunlaboro kun la ŝtataj kulturcentroj en la socialismaj landoj.

Oni rekomendis al ĈEA, ke en Ĉeĥio, kie estas plej multaj eblecoj, kunlabore kun Terminologia Esperanto-Centro, laŭeble estu organizita internacia korespondanta kurso pri terminologio kaj normigado en

Esperanto. Al SEA oni rekomendis organizi la 7-an Internacian Metodikan Seminarion en 1989.

En la diversaj socialismaj landoj laboras aŭ studas fremdlandaj civitanoj el ŝtatoj, kie la E-movado estas ankoraŭ malforta. Celante helpi al la esperantistoj en tiuj landoj oni rekomendis al la E-asocioj, laŭeble organizi kursojn por tiuj fremduloj.

Multan tempon oni apartigis ankaŭ al la estonta Monda E-Centro en Bjalistoko, kies konstruado la apartaj E-asocioj subvencios laŭ siaj eblaj.

Gravan lokon oni donis al la laboro kun la junaj esperantistoj — la estonteco de la movado.

La reprezentantoj de la E-asocioj reciproke informiĝis pri la stato kaj evoluperspektivoj de la asocioj. Oni konstatis, ke preskaŭ en ĉiuj socialismaj landoj estas gravaj ŝanĝoj en la strukturo kaj agado favore al la E-movado.

La 21-a konsultiĝo de E-asocioj de socialismaj landoj pasis aferece en spirito de reciproka kunlaboro.

Dimităr PAPAŬOV,
Generala Sekretario de BEA



Enlanda movado



Gelernantoj de la VI-a klaso de baza lernejo "K. Veličkov" en Sofio sub la gvido de S-ino Maria Slavčeva lernas kaj kantas en Esperanto.

Foto: Ĝavdar NAJDENOV

Ni bezonas praktikan laboron!

Surbaze de la nova teritoria strukturo de la ĉefurbo, ĉe la komunumoj en Sofio fondiĝis 15 teritoriaj Esperanto-societoj. Funkcias ankaŭ societo de blindaj esperantistoj por la tuta urbo. Dum la kunvenoj de la societoj estis elektitaj novaj gvidorganoj. En 10 el ĉiuj 16 esperantistaj societoj la elektitaj prezidantoj estas

novaj kaj precipe junaj homoj. Tio postulas unuigi la saĝecon de la spertuloj kun la aŭdaco de la junularo.

La 23-an de junio 1988 en la urba Esperanto-klubejo en Sofio kunvenis la estraranoj de la sofiaj societoj. Partoprenis la kunvenon niaj eminentuloj Nikola Aleksiev, Kunĉo Vălev kaj aliaj movadanoj.

Gvidis la kunvenon Dimitâr Papazov — ĝenerala sekretario de BEA. Li koncize informis la partoprenantojn pri la stato de la Esperanto-societoj post la komenciĝinta renovigo de BEA. Krome, li substrekis la ĉefajn taskojn de la estonta poresperanta agado en Sofio. En la informo estis emfazite, ke la laboro de la Sofiaj esperantistaj societoj devas esti modelo por la tutlanda esperantista movado.

Do, la kunveno fariĝis bona kvalifikejo por junaj societgvidantoj, kiuj interŝanĝis utilan informadon, sperton kaj pensojn pri la estonta laboro. Interesa estis la informo de la novelektita, sed sperta esperantisto Jordan Jordanov — prezidanto de la societo „Stefan Minkov“ — komunumo „Krasna poljana“. Li eĉ parolis pri sukcesoj de la societo, kvankam ĝi ek-

zistas nur kelkajn monatojn. La partoprenintoj starigis multajn demandojn al la Centra Estraro de BEA kaj faris proponojn por plibonigo de la Esperanto-movado. Al la demandoj respondis Dimitâr Papazov.

Evidente pli facile oni estas doni ideojn, proponojn kaj teorie diri kiel fari tion aŭ alion. Nun ĉiuj esperantistoj de la simpla membro ĝis la plej alta gravulo de la Esperanto-movado devas pli ofte kaj altnivele agadi ol paroli pri tio. La kampo de la Esperanto-movado estas sufiĉe vasta, por kapablaj, sinceraj kaj laboremaj agantoj, kiaj en la ĉefurbo vere abundas. Kaj la Sofia esperantistaro atendas ilian praktikan laboron.

Radoslav PARAŠKEVOV,
sekretario de la Komisiono pri organiza agado
ĉe BEA

Internacia kunlaboro estas bezonata

La iniciatoro de Esperanto kaj la unuaj esperantistoj tre bone komprenis, ke por evoluo de la lingvo kaj ĝia enradikiĝo en la internaciaj rilatoj estas necesa vasta kaj bone organizita esperanta movado. Pro tio oni eldonadis adresojn de la gesamideanoj dissemiĝantaj tra vasta Esperantujo, kreis simbolojn—insigno kaj standardo, kaj multe laboris por starigo kaj bona funkcio de grupoj, kluboj, societoj, asocioj k. a. Diversspecaj renkontoj naciaj kaj internaciaj, kiel kongresoj, seminarioj havas gravan signifon por la plua evoluo de la lingvo kaj la movado. Certe ambaŭ stagnos kaj forvelkos sen tiaj kontaktoj kaj kunlaborado. Ankaŭ tio estas unu el la kialoj, ke ni esperantistoj kontraŭas la militojn kaj la interpopolajn konfliktojn. Ili malhelpas nian agadon por kaj per Esperanto.

En la pasinteco, kiam prezidanto de la esperanta societo en urbo Dimitrovgrad es-

tis nia fervora samideano Valĉan Ĥristozov, li multon faris por subteno de intensaj rilatoj inter la esperantistoj en Dimitrovgrad kun tiuj el la itala urbo Grosseto. La kontaktoj inter ambaŭ societoj tiom evoluis, ke ties estraroj sukcesis starigi bonajn kontaktojn inter diversaj komunumaj k. a. instancoj. Okazadis reciprokaj gastadoj inter komunumestroj, kulturaj kaj sportaj agantoj, reciproke estis efektivigitaj ambaŭflanke koncertoj, spektakloj. La lokaj gazetoj skribis multe da materialoj pri tiuj tre utilaj kaj interesaj kontaktoj, kiuj estis realigitaj pere de Esperanto. La prestiĝo de nia lingvo kaj de la lokaj esperantistoj dank' al tiu ĉi agado ege kreskis en ambaŭ urboj.

Nun ĉirkaŭ deko da niaj societoj en la lando havas pli aŭ malpli viglajn kontaktojn kun la societoj en ĝemelurboj en eksterlando. Ekzemple societo „Albatroso“ en urbo

Varna havas sufiĉe viglajn ligojn kun la esperantistoj kaj ties organizoj en la urboj: Roŝtok (Germana Demokrata Respubliko) kaj Odesa (Sovetunio). Oni devas flegi ne nur korespondajn kontaktojn, sed ankaŭ personajn. Tre vigle interrilatas la esperanta societo en urbo Sliven kun la societo en la

hungara urbo Pécs. Tre ofta estas reciproka gastigado kaj partopreno en lokaj aranĝoj.

Sur la paĝoj de nia asocia organo devas aperadi artikoloj kaj informoj pri sukcesa agado de societoj el la ĝemelurboj. Oni devas turni specialan atenton al ilia agado.

Nikola NIKOLOV

Ĉe BEA funkcias gazetara servo

Al Komisiono pri Kultur-Informa Agado, ĉe BEA estis kreita Gazetara Servo, al kiu oni komisiis gravan taskon propagandi kaj informadi pri la tuteca por kaj per esperanta agado en la lando. Gvidanto de la Gazetara Servo estas Donĉo Hitrov, ĝenerala sekretario de TEĴA kaj multjara ĵurnalisto.

La stabon de la Gazetara Servo ĉe BEA konsistigas spertaj esperantistoj-ĵurnalistoj kaj redaktoroj: Maria Jankova — ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto”; Georgi Miĥalkov — redaktoro en la Eldonejo ĉe BEA; Evĝeni Georgiev — redaktoro de la bultenoj eldonataj de BEA, Slavĉo Davidov — redaktoro de bulteno bulgarlingva „Esperanto-Informo”, Veneta Baleva — redaktorino en „Paco”, Atanas Ilkov — redaktoro en „Bulgara Esperantisto” kaj aliaj spertuloj pri gazetaraj aferoj.

Helpe de la Asocio de Bulgaraj Ĵurnalistoj la Gazetara Servo havigis al si nomaron de ĉiuj gazetoj, revuoj, radio kaj televidstacioj en la lando, al kiuj estos sendataj informoj (en bulgara lingvo) pri ĉiuj pli gravaj kaj interesaj eventoj kaj aranĝoj en la bulgara kaj internacia Esperanto-movado. Gazetara Servo ĉe BEA pretas havigi al apartaj redakcioj speciale menditajn aŭtorajn materialojn pri konkretaj temoj kaj aranĝoj. Ĉiu GS-stabano respondecas pri konkretaj gazetoj, revuoj kaj elsendstacioj, kun kiuj ili devas esti en kontaktoj.

Por starigi senperajn kontaktojn kun redakcioj de amaskomunikiloj en la novekreitaj administraj centroj de la lando, la gvidanto de GS ĉe BEA Donĉo Hitrov vizitis la redakciojn de la distriktaj gazetoj „Popola Voĉo” en Loveĉ, „Patrolanda Voĉo”, „Komsomola fajrero” kaj la Radio-stacion

en Plovdiv, „Nigramara Lumturo” kaj la Radio-stacion en Burgas. Li renkontiĝis kun iliaj ĉefredaktoroj kaj interparolis pri eblecoj plivigligi la aperigadon de diversspecaj ĵurnalismaj materialoj pri Esperanto. Li informis siajn kolegojn pri plej gravaj antaŭstarantaj aranĝoj — la jam tradicia sesio de la Internacia Somera Espeanto-Universitato en Veliko Târnovo, al celebrado de 30-jara jubileo de Bulgara Esperanto-Teatro, 10-jariĝo de Sofia Esperantista Horuso, Internaciaj Junularaj Esperantistaj Someraj Laborbrigadoj en Pleven kaj en vilaĝo Sâdievo (distrikto de Burgas), internaciaj kursoj de Esperanto (en kvar gradoj) en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisania (regiono de Smoljan), Internacia Festivalo de Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj-Esperantistoj en urbo Vraca, k. a. Ĉiufanka helpo estis promesita kaj rezultoj ne malfruiĝis. La centra ĉefurba gazeto „Patrolanda Fronto” publikigis intervjuon kun Sava Dâlbokov, prezidanto de BEA, pri la novaj strukturoj de l'asocio kaj ĝia estonta agado. Estis esprimita preteco aperigi specialan rubrikon pri Esperanto en la ĉiuvendreda eldono de la gazeto. Radio-stacio Burgas elsendis ampleksan intervjuon kun D. Hitrov pri antaŭstarantaj E-aranĝoj en la distrikto.

La ĝisnunaj rezultoj de aktivado de la novekreita Gazetara Servo ĉe BEA estas kuraĝigaj kaj pruvas la celkonformecon de ties ekzistado.

Interŝanĝo de spertoj kun ceteraj E-asocioj estas bonvena kaj kunlaborado dezirata.

Radi BANĈEVSKI

III Turistaj Esperanto-Tagoj en Sofio

1-a tago. Trarigardo de ekspozicio „La Vojo” en la Muzeo de Revolucia Movado, la ekspozicio de la Ĉasista-Fiŝkaptista Asocio kaj la Historia Muzeo.

2-a tago. Vizito de la Zoologia Ĝardeno. Interkona renkontiĝo en la salono de Teĥnoekspost. Belarta programo, koktejlo.

3-a tago. En la teatra salono de Legejo „Videlina”, kvartalo Panĉarevo, belarta programo „Esperanto-talentuloj sin prezentas”. Kolektivaj ludoj, grupaj kantoj, promenado per ŝipo sur la lago.

4-a tago. Festo de montodomo „Esperanto” en monto Vitoŝa. Belarta programo, amuzaj grupaj ludoj, prelego pri Esperanto. Montara kurado por infanoj-gelernantoj kaj plenaĝuloj sub la aŭspicio de revuo „Bulgara Esperantisto”.



- Anticipa informado per la radio, televido, ĵurnalo „Veĉerni Novini” kaj gazeto „Eĥo”.

- Entute pli ol 800 partoprenantoj el 21 urboj. Gastoj el Jugoslavio, Hungario kaj Angolo.

- En la tri variaj belartaj programoj partoprenis 51 personoj. Krome kantis kaj ludis 6 grupoj kun 71 dancistoj kaj kantistoj.

- La montaran kuradon „Esperanto'88” partoprenis 54 konkursantoj.

- El pli ol 500 ĉeestantoj de la Festo de Montodomo „Esperanto” 60 aĉetis lernolibrojn de Esperanto kaj 43 enskribiĝis por lerni la lingvon en la konversaciaj kursoj por turistoj.

Koncize tia estas la „biografio” de la ĉijara turista aranĝo. Ĝia kulmino estis lasttage. Tiam sur la hebrejo de montodomo „Esperanto” okazis la festo de la montodomo. Estis bunda kaj varia belarta programo, gajaj ludoj kaj amasa kurado. Post la sukcesa fino de la aranĝo la organizintoj de la Tagoj eksidas sur la herbejo iomete antaŭ sia foriro al Sofio. Ni aŭdu parton de ilia postaranga bilanco rakontanta pri iliaj strebo, laboro, optimismo kaj deziro por plua E-agado.

Nikola Nikolov: „Nun mi povas diri, ke

eĉ mi — ĉiama optimisto, estas surprizita, ke la Turistaj Esperanto-Tagoj tiel bone sukcesis. Oni eĉ ne imagas la grandajn neantaŭvideblajn malfacilaĵojn, kiujn ni devis venki antaŭ kaj dum la Tagoj. Mi pensas, ke ĉi-jare bone reliefigis tri ĉefaj ecoj. Unue — multnombra kaj aktiva partopreno de la gesamideanoj el Sofio. Estas jam evidente, ke ili komencas senti sin kiel dommastroj kaj kunaranĝantoj de la Tagoj. Ili venigis siajn familianojn kaj amikojn. Amase partoprenis gepatroj kun siaj infanoj, geavoj kun la genepojn. Ĉeestis ankaŭ



„Montara kurado „Esperanto'88“. S-no Nikola Nikolov elverŝas akvon por bonŝanco de la junaj partoprenantoj.

geesperantistoj el 20 provincaj urboj. Venis kaj partoprenis la programon grupoj el Kjustendil, Ruse, Varna kaj Ĥaskovo. Due la abundo de programeroj en kaj por Esperanto. Multaj geesperantistoj strebis ne krokodili kaj kuraĝe praktikis Esperanton. Kaj ne laste — la amasa aktiva partopreno de gejunuloj, precipe en Panĉarevo kaj sur Vitoŝa-monto.”

Stefka Ĉenkova: „Vere estas tro malfacile efektivigi tian grandan iniciaton, kiu okazas dum kvar tagoj en diversaj lokoj, havigi salonojn, organizi programojn kaj la necesajn instalaĵojn, samtempe elspezante malmulte da monoj.

Certe iuj preferus, ke en la belartaj programoj partoprenu nur profesiaj kaj elstaraj aktoroj. Laŭ mi tamen ni bone faris doninte eblecojn al multe da novuloj sin prezenti sur la podio. Ja por tio estas necesa kuraĝo! Kiam iu kuraĝas aperi antaŭ „la tribunalo“ de la publiko, li travivas

malgrandan streson. Se la ekzameno estas sukcesa, la ekzamenito poste sentas sin kontenta kaj feliĉa. Tio por li ne estas io bagatela.”

Sonja Koleva: „Plej karakteriza pri la ĉi-jaraj Tagoj estis la abundeco de programeroj kaj la varieco de iniciatoj.”

Ivan Ivanov: „La gejunuloj estis eviden-



Amuza ludo.

te kontentaj. Ili sen instigo partoprenis diversajn programojn. Multaj bedaŭris, ke



Margarita Radulova el Sofio ĉarme kantas en Esperanto.

la aranĝo ne daŭris multe pli longe.”

Nevjana Krâsteva: „Min impresis la fakto, ke multe da novaj E-talentuloj aperis sur la scenejoj. Nu, iuj kantis aŭ rolis iom timeme, sed estis evidente, ke ĉiuj klopodis bone sin prezenti. Sed ne nur gejunuloj fervoris. Ankaŭ maljunaj profesiaj kaj amatoraj aktoroj venis kaj aperis sur la scenejo.

La partoprenantoj en la spektaklo „Mister Twister” diris, ke la sabato en Panĉarevo restos por ili neforgesebla. Tie ili por unua fojo havis eblecon ludi antaŭ multnombra esperanta publiko. Ili rimarkis, ke oni sincere aplaŭdis ilin sur la scenejo. Plaĉis al ili la gajaj ludoj kaj la promenado per ŝipo. Ankaŭ ili kunkantis esperante sur la ferdeko kune kun ĉiuj. Ili ekamis la hungaran

gaston Imre Bajak. Kun li ili por unua fojo kuraĝis konversacii esperante. Forte impresis ilin, ke li sukcesis kantigi ĉiujn ĉeestantojn en la teatra salono, instruante al ili nekonatan gajan hispanan kanton.”

Margarita Radulova: „Estis tre bone, ke multaj el ni estis samtempe kaj publiko kaj plenumantoj. Min varbis por Esperanto la Turistaj Esperanto-Tagoj. Al mi plaĉis ĝuste la amika kaj familia etoso de la aranĝoj — multe da sincera rido, bona humoro kaj emocioj.”



Interkona vespero. Post varia belarta programo sekvas regalo.

Fotoj: Ĥristo METEV

La organizantoj havos sufiĉan tempon por detale analizi sian laboron kaj la efikon de la aranĝo. Evidente ili klopodos fari la Turistajn Esperanto-Tagojn ankoraŭ pli interesaj kaj allogaj. Pluan sukceson!

ATENTIGO AL ĈA E-INSTRUISTOJ

En artikolo de Marin Băcev, presita en n-ro 4/88 p. 8—9 de „BE” pro miskompreno oni skribis la neekzistantajn en la regularo de Komisiono pri Instruado kaj Scienca Agado (KISA) pritaksojn „bonege” kaj „Meze bone”, kvankam „perfekta” kaj „elementa”. Do, restas la ĝisnuna terminoj de la pritaksoj: perfekta (6), tre bona (5), bona (4), elementa (3), nekontentiga (2). Ĉe similaj misinformoj turni vin al KISA, tel. 54-51-80!

Pri la naturo de Zamenhofa mondkoncepto (1876—1879)

Canko MURGIN

ESEO I

1. Estimo kaj Honoro al Zamenhof:

La personeco de D-ro Lazaro-Ludoviko Zamenhof (1859—1917), iniciatoro pri Lingvo Internacia „Esperanto“, estas objekto de ĉiujara oficiala omaĝo (eĉ dufoje: en Aprilo kaj en Decembro) fare de la monda esperantistaro. Dum la pasinta unua jarcento de Esperanto (1887—1987) aperis dek miloj da verkoj (studoj kaj eseoj, artikoloj kaj biografioj, poemoj kaj kantoj), dediĉitaj al la Zamenhofa vivo, agado, verkaro. En la nuna epoko oni organizas ĉiun jaron du mil kunvenojn (lokajn, landajn, internaciajn) por solene festi la humanisman faron de Zamenhof pri unuigo de la homaro en nedisigeblan tuton kaj pri sukcesaj atingoj de Esperantaj Lingvo, Movado, Literaturo.

Kaj oni estimas, honoras kaj gloras D-ro Zamenhof ne nur pro Esperanto, ne nur pro ties verkoj kaj tradukoj en tiu lingvo, sed esence kaj plejparte — pro ties apostola agado por pli da Bono, pli da Belo, por pli da Vero en la mondo. La lingvo Esperanto estas konsiderinda socia atingajo, sed ne ekskluziva kaj tute ne panacea rimedo por perfektigo de la homaro. Preskaŭ senescepte, Zamenhof klare vidis kaj montris la celon en malproksimo, sed li multe zigzagis en serĉado de vojo (metodo, maniero) por atingi de tiu celo. Sed feliĉe, la esperantista movado estis nek sola, nek izolita socia faktoro. Aliaj potence organizitaj fortoj de la socio sciis kaj povis kontribui al tuteca perfektigo de la homaro. Tio aktualigadis la celon de la esperantistaro kaj akcelis la progresadon pri apliko de Esperanto en la vivo internacia.

Bedaŭrinde, la grandega parto el verkoj pri Zamenhof estas — laŭ kvalito — sub la

minimumo de postulata nivelo. Ĉiun jaron, ties aŭtoroj senĝene ripetas konatajn informojn, banalajn asertojn. Kaj tamen kvankam malofte, ne mankas aŭtoroj kaj oratoroj, klopodantaj por konigi sian vidpunkton en nova lumo, konforme jen al novetrovitaj dokumentoj, jen al subita malkovro de novaj koncepto kaj esenco, nuanco kaj senco, detalo en malnovaj faktoj, evento kaj dokumento por aktualigi kaj modernigi la mondkoncepton kaj la platformon de Zamenhof por rekonstruo de la nuna homaro al unuecigo nereturnebla.

2. Ĝenerale pri Verkoj kaj Tradukioj de Zamenhof en Servo al la Homaro:

La originala verkaro de Zamenhof ne estas ekskluziva laŭ volumeno, sed en certa grado ĝi potence altiras la atenton de la esperantistaro pro pluraj „raciaj“ kaj „filozofiaj kernetoj“ kun daŭra valoro por la homo, nacio, homaro. Tiu verkaro estas unu el la fontoj de novaj, pli precizaj reaprezoj laŭ la postuloj de pulsanta mondkoncepto kaj kreskanta kontribuo de Zamenhof (eĉ post ties morto en Aprilo 1917) al solvo de problemoj soci-klasaj, tutnaciaj kaj komune-homaj (internaciaj). Ĉiu nova generacio de Esperanto-adeptoj estas — ne malofte — atestanto ege surprizita pro malkovro de tute freŝa moderneco en iamaj, malnovvegaj Zamenhofaj profunda humanisma pensado, kortuŝa homama sentemo kaj tre insistaj tezoj pri rekonstruo de la vivo homara.

Observante la agadon kaj la verkaron de Zamenhof, en ĉiu etapo de la vivo, oni trovas sinceran klopodon al inventemo por fundamenta perfektigo de la internaciaj rilatoj per starigo de toleremo kaj amikeco, de konkordo kaj kunlaboro en la sferoj de politiko, ekonomio, kulturo. Al tiu originala verkaro mi devas aldoni la ampleksan kaj

dignan traduklaboron de Zamenhof. Nun (kaj ĉiam), laŭ la elekto mem de la tradukitaj verkoj en Esperanto kaj laŭ la nivelo de traduko oni povas rikolti abundan kaj fidindan materialon por juĝi pli precize la tutecon personecon de Zamenhof, la lingvisto, edukanto, kaj filozofo. Per liaj ŝato kaj prefero al verkoj kaj ties aŭtoroj, oni rimarkas korvarman zorgon pri la estonteco de la homaro kaj brilan prognozon kun garantio pri fina venko de Beleco, Progreso, Internaciismo.

3. Zamenhof — patrioto kaj internaciisto per la ĵargono „Jidiŝ“ kaj Artefarita (Lingwe Universala) — (1876—1879):

Jam de infana aĝo Zamenhof sciis, ke la hebreoj — dissemitaj en diversaj landoj tra la tuta mondo — perdis sian gepatran, parolatan lingvon kaj ekskluzive aŭ plejparte ili parolas la lingvon de tiu lando en kiu (ili) loĝas. Duon-escepton faras la hebreoj en Orienta kaj Centra Eŭropo (Rusio, Germanio, Aŭstrio k. a.) kiuj parolas ankaŭ sian novan gepatran lingvon — la ĵargonon „Jidiŝ“ (nov-hebrea, hebrea-germana lingvo, kiu estas dialekto de germana lingvo), kaj la oficialan lingvon de la ŝtato, en kiu ili loĝas. Zamenhof, juna ŝatanto de filologio, revis patriote, ke la tuta hebrea gento en la mondo alproprigu al si la ĵargonon, por ke la hebreoj havu nacian lingvon, por ke ili estu savitaj el asimilado, por ke ili disvolvu propran literaturon kaj havu propran kontribuon al la internacia kulturo.

Estante lernanto en Dua Filologia Gimnazio de Varsovio (1874—1879) Zamenhof verkis ampleksan gramatikon de la ĵargono „Jidiŝ“ (1877—1879). Evidente, pro tio li aperas en la okuloj de la mondo kiel patrioto, sincere por la bono de sia tuta gento. Tamen, apenaŭ fininte grandan parton de la preparlaboro pri enkonduko de tiu ĵargono, kiel nacia lingvo por la tuta gento hebrea, Zamenhof komprenis, ke la trijara periodo (1877—1879), por verki „Jidiŝ“-gramatikon, estas preskaŭ vane perdita. Tiu lingvo (ĵargono) estas nenormigita ne nur en 1879, sed ankaŭ eĉ en 1909! En 1909 Zamenhof prezentis sian

manuskripton de „Jidiŝ“-gramatiko al A. Litvin, redaktoro de monata hebrea gazeto „Lebn un Visnŝaft“ (vivo kaj Scienco), en Vilno. Aperis nur la komencaj du ĉapitroj (Enkonduko, Ortografiaj Komentoj). La ceteraj ĉapitroj (Substantivoj, Adjektivoj, Numeraloj ktp.) ne aperis, ĉar la redaktoro A. Litvin postulis modifojn en la teksto de gramatiko. Zamenhof ne konsentis pri altrudataj ŝanĝoj fare de redaktoro. Tiamaniere fiaskis la plena aperigo de „Jidiŝ“-gramatiko, kvankam temis nur pri eldono en periodaĵo. Tio tamen konfirmas, ke la ĵargono „Jidiŝ“ ne estis normigita, toleras paralelaĵojn, kiuj incitas akrajn disputojn.

Evidente, la ĵargono „Jidiŝ“ ne posedis kvalitojn por sukcese batali kontraŭ franca, angla, hispana k. a. lingvoj, parolataj de la hebreoj en diversaj landoj. Tial, tute ne estas mirinde, ke la manuskripto de „Jidiŝ“-gramatiko restis neeldonita dum tuta jarcento. Oni eldonis ĝin nur antaŭ deko da jaroj:

(a) **por kontentigi** bibliografian bezonon de la esperantistaro kaj

(b) **por konigi** tiun verkon al la mondo kaj pli precize al la scienca mondo.

La hebreoj en france parolantaj landoj (Francio kaj Belgio, Svislando kaj Kanado k. a.) apenaŭ decidis entrepreni enkondukon de kroma lingvo — la ĵargono „Jidiŝ“ — por ke tiu fariĝu nacia lingvo de hebreoj nur pro platonisma motivo. Same tiel statas la afero kun la rilato de angle parolantaj hebreoj (en Britio kaj Usono, en Kanado kaj Aŭstralio, Nov-Zelando k. a.), de hispane parolantaj ktp.

Kaj tamen, la pretigo de „Jidiŝ“-gramatiko estis verko historie necesa por la hebreoj, parolantaj ĝin, por la sciencoj lingvistiko, germanistiko, hebrestiko, etnografio k. a. Zamenhof registris la staton de tiu lingvo („Jidiŝ“) en la mezo de la dua duono de XIX jarcento. Krom tio, plenumante perfekte tiun ampleksan taskon, Zamenhof riĉigis sian sperton lingvistikan, kiu — tiamaniere kompletigita — estis utila al lia plua kpolodo por daŭrigi sian plan-

lingvan kontribuon, donante definitan formon al sia planlingvo el „Lingwe Universala” (1878) al Lingvo Internacia „Esperanto” (1887).

Jen interesa detalo. Kvankam Zamenhof ellaboris sian artefaritan „Lingwe Universala” (1876—1878), unu jaron pli frue (1878), li ne donis preferon al ĝi, kaj tial li daŭrigis labori por finpretigi (1877—1879) la gramatikon de ĵargono „Jidiŝ” (1879). Tio sendube atestas, ke Zamenhof konsideris ambaŭ tiujn verkojn egale gravaj, absolute necesaj: (a) De unu flanko la tuta hebrea gento objekte bezonis propran, sed ne fremdan, nacian, lingvon por sin ŝirmi kontraŭ asimilado. Evidente, Zamenhof supozis, ke la ĵargono „Jidiŝ”, kiu tiam estas nacia lingvo nur de la hebreatoj en Orienta kaj Centra Eŭropo, povus laŭplane disvastiĝi inter la hebreatoj tra la tuta mondo. Tiamaniere, la hebreatoj, kiel unu tuto, daŭri-

gos krei propran literaturon en tiu lingvo kaj ili havos pli grandan nacian kontribuon al la monda kulturo. (b) Samtempe, la internacia vivo delonge sentas kreskantan bezonon de internacie uzata, neŭtrala lingvo. Tiu bezono de la homaro estas nur parte kaj nur provizore solvita per uzado de kelkaj grandaj naciaj lingvoj en internaciaj rilatoj (la franca, angla, rusa, germana, hispana, ĉina, japana k. a.). Tamen daŭra kaj efika solvo povus veni nur per uzado de neŭtrala internacia planlingvo (racie konstruita lingvo), kiu komence kune kun la kelkaj naciaj lingvoj, jam delonge uzataj en la internacia sfero, sed frue aŭ malfrue la homaro donos avantaĝon al la internacia planlingvo. **Estas evidente, ke laŭ siaj intencoj kaj faroj, Zamenhof aperas ne nur kiel patrioto de sia gento, sed ankaŭ kiel internaciisto (patrioto de la homaro, homaristo, Homo).**



La famaj rokoj ĉirkaŭ bulgara urbo Belgradĉik.

Foto: Georgi VIKENTIEV

ESPERANTO — MIA ETERNA AMO

La 20-an de aprilo 1988 en la salono de legejo „Emil Ŝeker-giĵski” la Centra Esperanta Kulturdomo en Sofio organizis jubilean koncerton dediĉitan al la tridekjara Esperanta krea vojo de la konata aktoro kaj kanzonisto Miŝo Zdravev. Post la koncerto Miŝo Zdravev estis afabla respondi al la demandoj de nia kunlaboranto.

— S-no Zdravev, kiam por unua fojo vi surpaŝis la scenejon?

— Tio okazias en mia infanaĝo — naŭjara knabo mi partoprenis en la Infana Teatra Lernejo, organizita de la konata reĝisoro kaj pedagogo Nikolaj Fol. Neforge-sebla restos por mi la infana teatraĵo „La nuptoj de museto Miki” de Nikolaj Fol, en kiu mi ludis la ĉefrolon. Nur post unu jaro mi jam ludis la infanajn rolojn en dramoj prezentataj en la Nacia Teatro „Ivan Vazov”. Dum tiu tempo mi havis eblecon konatiĝi kun la plej eminentaj bulgaraj aktoroj — Krâstju Sarafov, Ivan Dimov, Vladimir Trandafilov k. a.

— Kiam vi konatiĝis kun Esperanto?

— Kun Esperanto mi konatiĝis hazarde antaŭ tridek jaroj. Sed mi restis fidela al ĝi, ĉar plaĉas al mi la propraj al ĝi ideoj pri paco kaj amikeco inter la popoloj.

— Kiam vi komencis kanti en Esperanto?

— Tuj post la ellerno de la lingvo. Unue mi ne kuraĝis fari tion, sed miaj samideanoj el societo „Heroldo”, kies membro mi estis, instigis min, helpis min per tradukoj de miaj kantoj kaj iel

nesentible mi fariĝis Esperanto-kanzonisto.

— Vi estas ege konata eksterlande — viaj kantoj sonis sur la scenejoj de multaj Esperanto-kongresoj kaj en la radioelsendoj de diversaj Esperanto-radiostacioj. En kiuj landoj vi gastrolis?


— Pluraj estas la landoj kie dum internaciaj Esperanto-aranĝoj mi kantis, sed mi menciis nur kelkajn: Danlando, Pollando, Anglio, Jugoslavio, Aŭstrio, Greklando...

— Estas interese, ke vi ne nur kantas Esperante, sed mem verkas la tekstojn de viaj kantoj kaj komponas iliajn melodiojn. Kiuj estas viaj plej ŝatataj kantoj?

— Mi amas ĉiujn miajn kantojn kiel miajn karajn idojn, sed la plej ŝatataj de mi estas „Bonan nokton”, „Bulgario”, „Saluton geamikoj” kaj „Dum sonĝ’ Atenon vidis mi”.

— La Esperanta publiko konas vin ankaŭ kiel talentan dramakoron kaj deklamanton. Rakontu iom pri via aktorado.

— Mi ludis en pluraj Esperantaj teatraĵoj, sed vere mia prefero estas la recitalo. Mi ege ŝatas la originalan



kaj tradukitan Esperanto-poezion. Mi recitis poemojn de Ivan Vazov, Krum Kjuljajkov, Ĥristo Gorov kaj de aliaj bulgaraj kaj Esperantaj poetoj.

— La esperantistoj konas vin same de viaj E-gramofondiskoj. Ĉu ne?

— Jes, ĝis nun aperis kvar diskoj kun miaj kanzonoj, unu disko, sur kiu estas registrita mia deklamado de poemoj de Ĥristo Gorov, kaj krome mi partoprenis kiel aktoro en la surbendigo de la dramo „Ni vivos!” de Julian Modest.

— Vi multe kontribuis al Esperanta kulturo, al bulgara kaj internacia Esperanto-movadoj. Per viaj Esperanto-kantoj vi kreis kaj edukis multajn junajn esperantistojn. Sed kion donis al vi Esperanto?

— Multajn amikojn kaj belegajn travivaĵojn. Esperanto estas mia eterna amo.

Intervjuis: Georgi MIĤALKOV

Pamfleto kaj kolomboj

La leganto verŝajne pensos, ke temas pri poezio, ĉar tiu branĉo de literaturo havas inklinon uzi nekompareblajn kontrastojn kaj nenekompreneblajn esprimojn. Sed tamen la supraj epitetoj estis uzitaj por pritrakti esperantologiajn demandojn en „Bulgara Esperantisto” n-ro 2/1988, p. 6, kvankam certe neniu kontestos, ke **esperantologio estas scienco**.

Scienca traktaĵo devas uzi klarajn esprimojn, ĉiun tezon argumenti per faktoj aŭ per tezoj de aliaj aŭtoroj. La lastaj devas esti aŭ citataj aŭ priskribataj senŝanĝe „laŭ spirito kaj litero” de la originalo. Ĉiu scienca traktaĵo antaŭ publikigo estas recenzata kaj atente kontrolata de redaktoroj. Precipe oni zorgas, ke tezoj de aliaj aŭtoroj ne estu kripligitaj aŭ mis prezentataj. Kiel profesia sciencisto, ankaŭ recenzisto kaj redaktoro de sciencaj verkoj, mi sentas devon atentigi, ke tio koncernas ĉiujn branĉojn de scienco, do ankaŭ esperantologion.

Bedaŭrinde, esperantologio havas nenian scienciston profesion en tiu branĉo. Redaktoroj de Esperantaj revuoj ankaŭ ne estas profesiaj ĵurnalistoj, despli — ne estas sciencistoj. Tial ne malofte aperas esperantologiaj tradukaĵoj, en kiuj estas plene neglektataj la supre menciitaj elementaj postuloj, iam tiuj artikoloj estas saturitaj per ofendoj kontraŭ aliaj aŭtoroj, per misaj klarigoj de pensoj de aliuloj. Al sperta leganto tia stilo montras, ke al la aŭtoro mankas argumentoj kaj la artikolo estas forĵetinda sen plua atento.

Unu (sed ne sola) el similaj traktaĵoj estas tiu de Bernard Golden. Bonvolu preni la ĉi-supre menciitan n-ron de „BE” kaj kompari liajn asertojn kun koncernaj citaĵoj el „Horizonto de Soveta Litovio”.

„**Pamfleta rebato**”: „Ĉu ne vana perdo de energio estas serĉado de pli internacia formo por iuj landnomoj nun, post preskaŭ

centjara zamenhofa uzado? Ekz. A. Albault (1974) asertas, ke Anglotero, Danmarko, Lituanio, Japonio, Polonio estas pli internaciaj ol la ĝenerale uzataj Anglio, Danlando, Litovio, Japanio, Pollando. Dubinde, ĉu tiu „internacieco” ne estas fakte „franceco” (Angleterro, Danemark, Lituanio, Japon, Pologne). Tiaj proponoj, lanĉitaj sub ŝildo de la Akademio, densigas ankoraŭ pli la malpuran akvon de esperantaj landnomoj.” (HdeSL” n-ro 6, 1983, p. 27.

Do, kie estas tiu „pamfleta bato?”

„Sed la samaj redakcianoj havas sian propran obsedan nocion (...): neniu popolonomo havu la sufiksan finaĵon-an” (aserto de B. G.) Sed ni skribis: „en la internacia lingvo tre gravas evito de ajna diskriminacio de apartaj nacioj kaj tial estas atentinda kaj plue evoluinda la propono de akademiano E. de Kock (Akademiaj Studoj 1984, p. 91) naciojn nomi per sensufiksaj vortoj, sed ne per derivaĵoj kun-iano. La prezentitaj de li ekzemploj: alĝeroj, aŭstralaj, aŭstroj, bolivoj, ĉiloj, liberoj, liboj, polinezioj, niĝeroj, siroj, tunizoj estas akceptindaj sen ajna klaŭzo.

Ni ne subtenas la proponon de E. de Kock ne uzi la sufikson -an por nomi la loĝantojn. Ĝi estas tre oportuna, kiam oni parolas pri loĝantoj de iu lando sen indiko de ilia nacieco. Ĝi estas konsistiga parto de „Fundamento de Esperanto” kaj ekzistas nenia argumento nek bezono por rifuzi ĝin”. „HdeSL” n-ro 8, 1985, p. 26.

Do, B. G. ŝanĝis rolojn de diversaj personoj, el iliaj paroloj li faris veran mikspoton, aldonate sian propran spicon.

Pri „kolomboj”: „Iom alispeca estas la timo de B. Golden pro „kolomboj” — loĝantoj de Kolombio. Kolombio estas baptita ne per nomo de kolomboj, sed per tiu de Kolumbo (esp. laŭ PIV, latine Columbus,

itale Colombo). Necesas nur korekto de unu litero: anstataŭ Kolombio skribi Kolombio. Se tiu ĉi lando akiris tiel honoran nomon, ĝiaj loĝantoj tute laŭrajte povus sin nomi kolumboj (certagrade — pranejoj de Kolombio). Kolombio estas nomo pli internacia ol Kolombio: en la al ni disponebla statistiko la nomon kun la radiko Kolumb-havas 14 lingvoj el 24. „HdeSL” n-ro 8, 1985, p. 26.

Do, ni tute ne, facilanime transbaptis ilin per la nomo „kolumboj”, sed ni skribis pri **ebleco uzi etimologie bazitan pli internacian formon „Kolombio”** kaj „kolomboj”. Kie estas bizaraĵo?

Ni ne povas preteriri senvorte la proponon nomi germanojn per „godoranoj” kaj „foroganoj”, ĉar nomi nacion, same kiel personon, per iu formulo povas nur tiu, kiu ne havas senton de estimo nek al alia, nek al sia propra nacio. Ili taŭgus eble nur por moka aŭ insulta celo. La nomitaj formulaĵoj nenian analogion havas kun la mallongigo „Usono” nek laŭ etimologio, nek laŭ karaktero de tiuj ŝtatoj.

Nenio riproĉinda estas en tio, ke multaj esperantistoj fariĝas amatoraj lingvistoj kaj penas ĉiamaniere perfektigi la internacian lingvon. Sed ni devus memori, ke traktante tiun sciencon ni devas atenti la elementajn leĝojn de scienco. Ilin alproprigi sen granda peno povas ankaŭ amatoro. Dua grava postulato: Esperanto fariĝis vivanta lingvo kaj devas evolui laŭ la samaj leĝoj kiel aliaj vivantaj, do — naciaj lingvoj. Kaj la plej grava el tiuj leĝoj estas **stabileco**. Ni memoru nur, ekz., malkongruon de prononco kaj ortografio en multaj naciaj lingvoj, kiu kutime spitas ĉiujn proponojn pri reformo. Pro tio tre atentinda estas pozicio de nuna prezidanto de Akademio de Esperanto A. Albaut: „Unua rolo de la Akademio: bremsil!” (Akademiaj Studoj 1985). Bedaŭrinde, tiun sloganon li lanĉis por aliaj, esceptante sin mem. Ni memoru nur kelkajn ekzemplojn: la supran pri 5 landnomoj (feliĉe, sen akcepto de la publiko), pri „Brazilo” anstataŭ la zamenhofa „Brazilio” (bedaŭrinde, ĝin senkritike ekuzis multaj li-

teraturistoj), pri propono formi landnomoj per 18 (!) manieroj (Akademiaj Studoj 1983) anstataŭ ne pli ol 3, uzitaj de Zamenhof kaj aliaj pioniroj de la Internacia Lingvo. Per tio A. Albaut ignoris la plej gravan fundamenton de Esperanto: **simplan kaj logikan strukturon**. Pri tio tamen kulpas ankaŭ aliaj esperantologoj, publikigante proponojn, iam inĝeniajn, sed senbezonaĵajn kaj malutilajn por vivanta lingvo.

Se niaj esperantologoj obeus la plej gravajn postulatojn de scienca verkado, baldaŭ malaperus el paĝoj de niaj gazetoj la „eterna” landnoma problemo. Ĝin certe ne solvos iu „papo kun senlima povo”, sed uzantoj de la lingvo kun **natura strebo al logiko kaj reguleco**. Ni ja vidas, ke ĉiam pli kaj pli niaj gazetoj, alia literaturo uzas landnomojn kun la finaĵoj -io kaj -lando. Tiun sistemon uzis jam Adam Zakrzewski, membro de Lingva Komitato, en sia verko „Historio de Esperanto 1887—1912”, kiu estis premiita dum la kongreso en Antwerpen en 1911, kie partoprenis L. Zamenhof, do, fakte aprobis ĝin. Logika en tiu verko estas ankaŭ vortografio de aliaj propraj nomoj. Ni havas jam antaŭlonge pretan solvon — ni ĉesigu la diskutojn kaj dispuojn kaj uzu ĝin.

A. VAITILAVIČIUS, redaktoro
de „Horizonto de Soveta Litovio”

La redakcio turnis sin al sia konsultato pri lingvaj demandoj Violin Oljanov por fari en la nomo de „BE” konkludan parolon al la spontanee naskita disputo.

„BE”



JES, POR SCIENCA DISPUTADO!

Al tio apelacias la disputantoj A. Vaitilavičius kaj Bernard Golden, tamen mem iliaj polemikaĵoj deflankiĝas de tiu postulo. Ne povas esti scienca la disputado, abunde surŝutita per pipro, kiu baziĝas sur satiraĵoj kaj akraĵoj.

La polemiko tuŝas la trivitan jam demandon pri la landnomoj, je kies tuja solvo povas kredi nur donkiĥotoj. Oni ne povas ŝanĝi (des pli per unu mansvingo), formojn, (en ĉi okazo — landnomojn), kiuj estas tradicie uzataj jam plurajn jardekojn. Oni povas disputi nur pri formoj paralele kaj egalkvante uzataj (Ukraino — Ukrainio, Koreo — Koreio, Egipto — Egiptio) aŭ pri (relative) novaj formoj. Mi ne vidas la kaŭzon ne uzi por gento-nomoj la sufikson -an! Tiu ja estas fundamenta sufikso kaj kiu povus ĝin malpermesi? Do, mi ne vidas ion kondamnindan eĉ en la uzo de forogano, godorano, aŭ pli ĝuste- Fo-Ro-Go-ano, Go-Do-Ro-ano (aŭ skribe: FRG-ano, GDR-ano). Ili estas germanoj laŭ nacieto, tamen ili estas anoj de diversaj ŝtatoj, kion ni esprimas per la derivaĵoj de la mallongiĝoj de la ŝtatnomoj, kiuj estiĝis komune kaj vaste uzuataj. Sammaniere ni uzas „sovetiano“. La samo validas pri la vortoj „kom-somolano“, UEA-ano“, BEA-ano, CK-ano, tanzaniano, beneluksano k. a.

Ĉiu rajtas uzi ĉiujn ajn formojn, konformajn al la strukturo de Esperanto, aŭ ne uzi ilin, se ili ne plaĉus. Kaj tio estas pli bona maniero esprimi sian rilaton al difinitaj formoj ol senfine disputadi fendante la haron. Kiam mi konsideras iun vorton aŭ esprimon konforma al la leĝoj de la lingvo, mi ne interesiĝas ĉu ĝi plaĉus al iu aŭ ne. Kaj en la konkurado de la diversaj formoj (ne per la polemiko, sed per la uzado) la vivo elektos unu el ili, aŭ povas eterne lasi la ekzistadon de la du. La vivo elektis por ŝtatnomoj la finiĝon -io prefere al -ujo dank' al la uzado kaj ne de la polemikado. Do, al la demando de B. Golden kiu posedas la povon aŭ rajton krei tiajn nomojn kaj enkonduki ilin en la Esperantan leksikon, mi respondas per la vortoj de L. Zamenhof: la Esperanta popolo. Konklude: la tradicio en la lingvouzo estas tre forta faktoro kaj estas plena sensencaĵo batali kontraŭ ĝi. Ĉar ja tradicia estas tiu formo, kiu estas adoptita de la Esperanta popolo, kiu estas trudita ne de iu ajn persono, sed de la vivo mem, de la iom-postioma evoluo. Fari proponojn kaj provi trudi elpenesitajn lingvoformojn estas utopio havanta nenion komunan kun la natura evoluo, kiu nura certigas perfektigon de la lingvo.

Violin OLJANOV

STRATO "ESPERANTO" EN URBO POMORIE

La 10-a de majo 1988 por la esperantistoj el societo "Trifon Hristovski" en urbo Pomorie estis vera festo. La ĝoja evento estis inaŭguro de strato "Esperanto". Ĝi ne estas longa, sed troviĝas en la centro de la urbo kaj kondukas al la maro.

Honoraj gastoj de la sole-

naĵo estis Bojko Pirev kaj Sijka Dragneva — lokaj sociagantoj kaj Elena Stojkova — organizanto de CE de BEA en la distrikto de Burgas.

Tanja Gramatikova — prezidantino de societo "Trifon Hristovski", legis interesan raporton. Lernantoj el la es-

perantaj klasoj de mezlernejo "Georgi Dimitrov" plenumis artan programon kaj sincere estis aplaŭdataj de la ravita publiko.

Ĉiuj esperantistoj sentis sin feliĉaj, ke altiris la atenton de siaj samurbanoj al la Esperanto-movado.

Smaragda JANEVA

Sincera amiko de nia lando

En novembro pasintjara forpasis en la aĝo de 80 jaroj Paul Neergaard (Nergor), sincera amiko de nia lando. En „Enciklopedio de Esperanto” (1933) oni legas: „Paul Neergaard, dano, specialisto pri plantopatologio, ĝardenkultura zoologio kaj genetiko. Naskita 19-an februaro 1907 en Nyborg. Esperantisto de 1925. Dum 1926—1928 li redaktis gazeton „La forta voko”. En 1929 li eniris la laboristan Esperanto-movadon.”

Li diplomiĝis pri agronomio kaj iĝis specialisto pri genetiko kaj patologio de la plantoj. Dum multaj jaroj li estris sekcion de la Dana Ŝtata Plantpatologia Servo; en tiu periodo li grave rolis en la difino de nova disciplino, „sempatologio”, kiu traktas la malsanojn portatajn de semoj. Internacian kunlaboron sur tiu kampo li pioniris inter 1956 kaj 1974, kiel prezidanto de la Plantpatologia Komitato de la Internacia Semkontrolo Asocio — tiu komitato fakte montris la vojon por internaciigo de aliaj agronomiaj fakoj. En 1967 kronis lian karieron la posteno de unua direktoro de la Dana Ŝtata Instituto de Sempatologio por Evolulandoj, kiu donis al li la eblecon, al kiu li delonge sopiris, okupiĝi pri la disvastigo de tenkiko kaj scio inter la malriĉaj landoj de la

mondo. Tiu laboro portis al Neergaard multajn honorojn, inkluzive de membreco en la Hinda Nacia Akademio de Agrikulturo, Franca Akademio de Agrikulturo kaj Esplorista Klubo en Novjorko.

Ankaŭ kiel faka aŭtoro kaj esploristo li fariĝis tre konata, verkante multajn studojn en la dana, la angla kaj Esperanto. Li estas aŭtoro de kvintlingva ĝardenkultura terminaro, kies seslingva eldono aperis en 1938. Lia monumenta ĉefverko estas la pli ol 1200-paĝa „Sempatologio”, aperinta en 1977. Unu el liaj lastaj libroj estas „Semo-Malsat-Inkubacio aŭ Vivofonto?”

Jam de 1925 Neergaard estas konvinkita pri la estonteco de Esperanto kiel scienca lingvo. La jarraportoj de lia laboratorio inter 1935 kaj 1950 ĉiam havis Esperantan resumon. En 1954 aperis lia referenca libro „Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” kaj en 1957 la populariga verko „La vivo de la plantoj”. Ĝi estis tradukita en la lingvoj ĉina, finna, litova, norvega, pola, portugala, serbokroata, sveda kaj bulgara (eldono de „Zemizdat”).

Neergaard prelegis dekfoje en la Universalaj kongresoj kaj oficis kvarfoje kiel rektoro de Internacia Some-

ra Universitato. En 1962 li prezidis grupon de sciencistoj, kiuj kunvokis la Unuan Internacian Konferencon pri la Lingva Problemo en la Scienco de la 47-a Universal Kongreso en Kopenhago.

Li estis prezidanto de LKK de la 47-a UK. De liaj manoj la reprezentanto de BEA transprenis la kongresan flagon por porti ĝin al Sofio por la 48-a Universal Kongreso.

Malnova membro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) kaj dum pluraj jaroj ĝia vicprezidanto, li estis ankaŭ fonda membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino kaj mem fondis la Internacian Akademion Comenius, kiu celas kunigi je internacia nivelo la plej eminentajn Esperanto-parolantajn sciencistojn, por plialtigi la prestiĝon de la lingvo.

Ne nur en sia profesia fako, sed ankaŭ sur la tereno de esperantologio Neergaard havas movadajn meritojn. En 1933 aperis lia unua studo „Fremdvortoj en Esperanto”; klasika estas lia superrigarda eseo „La esperantologio kaj ties disciplinoj”, eldonita unue de Laborista Esperanto-Klubo en Kopenhago (1924). Ĝia dua eldono aperis en 1979. De 1949 ĝis 1961 li redaktis en-

tute ses kajerojn de la revuo „Esperantologio“, la sola alt-nivela periodaĵo sur tiu pionira kampo, kaj cetere aperigis plurajn artikolojn en aliaj revuoj. Li respondecis pri la terminoj en „Plena Ilustrita Vortaro“ sur la tereno de botaniko, agrikulturo, hortikulturo kaj fitopatologio. Depost 1963 li estis vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj direktoro de ties sekcio pri bibliografio.

La esperantisteco de Neergaard ne estis io flanka aŭ hobia por li, sed integra kaj esenca ero de lia mondriĝo, kiu celis krei pli justan kaj egalecan mondon per la trafa apliko de la intelekto.

Neergaard kelkfoje vizitis nian landon kiel fakulo pri genetiko kaj patologo de plantoj, helpis al nia landa agronomio.

Lastfoje li vizitis nian landon antaŭ tri jaroj laŭ invito de Agrikultura Akademio „Georgi Dimitrov“. Li trovis tempon por gastigi en la kancelario de BEA kaj esprimis sian kontentecon pri la sukcesoj de Esperanto-movado en nia lando.

Paul Neergaard vivas en la memoro de nialandaj esperantistoj.

Ĥristo GOROV

Estona radio en Esperanto

Ĝiaj elsendoj okazas ĉiun unuan kaj trian ĵaŭdon de la monato laŭ la ondolongoj 290 m — 1035 kHz kaj 50,6 m — 5925 kHz je la 21.25 laŭ la Universala tempo. La ripetoj okazas dimanĉe de la sama semajno je la 09.20 laŭ UT.

Elsendodaŭro estas 10 minutoj.

En la landoj de la mezeŭropa tempo necesas aldoni al UT vintre unu horon kaj somere du horojn.

Bonvolu skribi viajn rimarkojn pri la aŭdebleco kaj enhavo de la elsendoj: Sove-tunio — 200 100, Tallinn, Estona Radio, Esperanto.

Prospektoj el Ĉeĥoslovakio

● Laplej maljunakaj plej granda ĉeĥoslovakaj vojaĝoficejoj ĈEDOK aperigis deksep-paĝan, kolore ilustritan esperantlingvan prospekton: ĈEDOK prezentas al vi ĉeĥoslovakion, kiun eblas senpage ricevi je adreso: ĈEDOK, Esperanto-fako, Na příkopě 18, CS—111 35 PRAHA 1, Ĉeĥoslovakio, tel.: 42 2 2127111.

● La entrepreno BALNEA, kiu reprezentas ĉeĥoslovakajn ŝtatajn banlokojn kaj termobanejojn ankaŭ aperigis esperantlingvan kolore ilustritan prospekton. „Ĉeĥoslovakaj termobanejoj: Por Via sano“, kiun eblas ankaŭ senpage ricevi je la adreso: BALNEA, Esperanto-fako, Pařížská 11, CS—110 01 PRAHA 1, Ĉeĥoslovakio, tel.: 42 2 263777. Tiu ĉi entrepreno BALNEA ankaŭ aperigis esperantlingvan kolorbildkarton: „Ĉeĥoslovakaj ŝtataj banlokoj“.

Afrikanaj esperantistoj en Bulgario

Kiel bona rezulto de kelkara entuziasma laboro de UEA por subteno kaj helpado de la Esperanto-movado en Afriko kaj precipe de la obstinaj kaj senlacaj streboj de Hans Bakker, ĉi-jare ankaŭ Bulgara Esperantista Asocio solidare ekagadis helpe al la nobla iniciato kaj invitis kelkajn junajn afrikajn esperantistojn viziti Bulgaron. Ilia restado daŭris preskaŭ unu monaton.


UEA sukcesis realigi tiun viziton pagante la vojaĝkostojn ĝis Eŭropo pere de la fonduso Azio-Afriko. La 5 afrikaj junuloj venis speciale por perfektigi lingve kaj organize.

Du el ili venis kelkajn tagojn pli frue ol la ceteraj, nome Foley Ekue el Togo kaj Kabeya Mulunda Daniel el Tanzanio. Tiun tempon ili dediĉis al vizito de kelkaj interesaj lokoj kaj al amikaj renkontiĝoj kun bulgaraj esperantistoj el la E-societoj en Sofio, Pazarĝik, Plovdiv, Ĉepelare, Smoljan. La afrikaj esperantistoj vizitis ankaŭ la redakcion de „Bulgara Esperantisto“, kie konatiĝis kun la sperto de la redakcianoj.

La intereso kaj la simpatio dum tiuj renkontiĝoj estis reciproka. La afrikaj junuloj vizitis por unua fojo nian malgrandan, sed belan landon kaj kapablis paroli Esperanton kun siaj novaj bulgaraj geamikoj. Ankaŭ la bulgaroj aparte ĝuis la unuan renkontiĝon kun afrikaj esperantistoj — prezentis sian societan vivon kaj montris al ili multajn interesajn vidindaĵojn en nia lando.

Ĉiuj kvin afrikaj samideanoj kolektiĝis en la fama Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, apud Smoljan, nome Foley, Kabeya, Ngarama Paul el Ruando, Bechikh Houari el Alĝerio kaj Mafuta-Wina el Zairio.

La E-kurson en la Kursejo gvidis du el la plej bonaj bulgaraj instruistoj — Fani Miĥajlova kaj Nikola Uzunov. Dum la kurso la afrikanoj havis eblecon plibonigi siajn lingvokonojn kaj ankaŭ informiĝi pri la historio kaj tradicioj, pri la sperto de bulgara esperantista movado. Ili havis senperajn kontaktojn kun la ceteraj gekursanoj kaj



Kabeya Mulunda Daniel el Tanzanio kaj Foley Ekue el Togo meze de bulgaraj amikoj el CE de BEA.

Foto: Ivan ĈULEV

kun la gastoj de la Kursejo. Ili kune veturis al la fama ripozloko Pamporovo, al Smoljan, kune promenadis. Vespere ili havis eblecon rigardi filmojn pri kaj en Esperanto.

Post la kurso en Pisanica la kvin afrikaj samideanoj veturis kune kun siaj bulgaraj geamikoj al la 44-a IJK en Zagrebo, Jugoslavio.

Esperable ĉiuj ili estas kontentaj kaj konservas bonajn rememorojn pri Bulgario kaj entuziasme utiligos la sperton de bulgara E-movado en siaj landaj E-klubo.

Cvetka MITEVA



Juna centjarulo impetas al la estonto

Tra la impona konstruaĵo de la Sofia Universitato, majeste situanta en la centro de Sofio, pasis kelkaj generacioj de bulgaraj intelektuloj. La iamaj studentoj hodiaŭ estas instruistoj, scienclaboristoj, gvidantoj en diversaj kampoj de la ekonomia kaj kultura vivo. Ĉiujare tie ĉi finas sian superan klercon pli ol 2000 gejunuloj. La Sofia Universitato „Kliment Ohridski” estas unu el la grandaj centroj de la bulgara scienco. Surbaze de diversaj kontraktoj pri kultura interŝanĝo, eksterlandaj profesoroj kaj scienculoj instruas en Sofia Universitato, kaj universitataj instruistoj gvidas seminariojn pri bulgara kaj slava kulturo en multe da landoj. La hodiaŭaj sukcesoj havas siajn radikojn en la centjara historio de la Universitato. Bona okazo, ke ni ĵetu rigardon malantaŭen en la tempo...

Modesta estas nia jubileo, apenaŭ 100-jara. Tia estis la historia sorto de la bulgara popolo, kiu vivis kvin jarcentojn sub la osmana jugo — sen propra ŝtato kaj kulturaj institucioj. Tiam ankaŭ estis forgesita la mezepoka kultura tradicio.

Alie komencsignoj de supera edukado ekzistis en la bulgara ŝtato jam en la IX-jarcento. La historiistoj kaj la filologoj indikas la Literaturan Skolon en Ohrid, fonditan en la dua duono de IX-jarcento de Kliment Ohridski, kiel formon de supera organizo de la spirita kaj instrua proceso. La simbola ligo inter Ohrida Literatura Skolo kaj la Sofia Universitato ne estas nur la nomo de Kliment Ohridski, ĝi troveblas en la malproksima tradicio de la bulgara kulturo.

Post la estingiĝo de kulturaj centroj kiel la Rila Skolo (XIII—XIV jc.) kaj la Kilifareva Skolo (XIII—XIV jc.), dum plenaj kvar jarcentoj neniu bulgaro havis eblecon fini superan klercon. Apenaŭ en la komenco de la XIX jarcento Nikola Pikolo estas la unua bulgaro, kiu finas superan klercon

eksterlande. Ne longe post Pikolo multaj junaj bulgaroj jam studas en Bukureŝto, en la grekaj akademioj sur insuloj Halki kaj Korfu, en Ateno, Prago, Kievo, Peterburgo, Parizo, Hajdelbergo k. a. Inter ili naskiĝas la ideo pri kreo de bulgara Supera Lernejo. Sed ĝis 1878 — la jaro de la fondiĝo de memstara bulgara princlando, similaj kondiĉoj ne ekzistas.

Unu el plej grandaj klopodantoj de akcio por malfermo de Supera Lernejo en Sofio estas la ĉeĥo Konstantin Ireček, ministro de la Popola Klerigo en la novliberiga el la osmana jugo bulgara princlando. La deputitoj en la parlamento voĉdonis en 1880 pri Fundamenta Leĝo por la bulgaraj lernejoj, en kiu oni starigis la taskon pri organizo de Supera Lernejo.

La 1-an de oktobro 1880 ĉe Unua Vira Gimnazio en Sofio oni organizis pedagogian kurson. Fakte, tio estis la komenco de la Universitato. La unua kurso konsistis nur el 43 studentoj. Dum la sekvantaj jaroj kaj jardekoj ekfunkciis diversaj fakultatoj kiel Fizika-Matematika, Jura, historia-Filologia. Meze de la instruistoj estis eksterlandanoj, plej multe ĉeĥoj. Kiel unua rektoro estis elektita la fama bulgara sciencisto Aleksandro Teodorov-Balan.

La studentoj formiĝis kiel unuj el la plej progresemaĵoj homoj en tiama Bulgario. Ili organizis mitingojn por defendo de la bulgara loĝantaro en Makedonio kaj la regiono de Odrino, kiuj ankoraŭ estis sub osmana jugo. Elokventa en nia historio estas la fakto, ke dum la inaŭguro de Nacia Teatro en Sofio studentoj prifajfis la nedeziratan princon Ferdinando-Saks-Koburgĥa.

Interese estas, ke en la unuaj jaroj en la Universitato ne studis junulinoj. La unuaj studentinoj enmatrikuliĝis en 1901.

Dum pluraj jaroj la Universitato ne havis

sian propran konstruaĵon. Jam en la fino de XIX jc. la fratoj Evlogi kaj Hristo Georgiev donacis por konstruo de la Universitato 6 800 000 levojn kaj terenon de 10 200 kv. m. en la centro de Sofio. La konstruaĵo, laŭ projekto de la franca arkitekto Breason, relaborita kaj plenumita de la bulgara arkitekto Jordan Milanov, estis preta en 1934.

Sed ni revenu en la festaj tagoj de 1988. La nuna studenta generacio ankaŭ havas siajn pintojn kaj problemojn, ĝojajn momentojn kaj pezajn sesiojn. La jubilea sole-
no daŭrigas dum la tuta jaro — sciencaj sesioj, simpozioj, koncertoj, artekspozicioj... Dum majo oni okazigis la Unuan Festivalon de la Studenta Arto.



En unu el la universitataj aŭditorioj.

Foto: Georgi DERMENĜIEV

La studentoj-komunistoj lasis daŭran spuron en la kontraŭfaŝista batalo. Pereis Vasil Vodeničarski, Stojan Edrev, Vela Peeva — ĉiuj esperantistoj.

Ankaŭ estis fidelaj esperantistoj la universitataj instruistoj akad. Vladimir Georgiev, prof. d-ro Miĥail Genovski. Amikoj de la Internacia Lingvo estis same akad. Stefan Mladenov, Ivan Ŝiŝmanov, akad. Miĥail Arnaudov, prof. Benjo Conev, prof. d-ro Josif Fadenheht. En Sofia Universitato dum multaj jaroj funkciis studenta Esperanto-societo „Vela Peeva“.

* * *

Dum tiuj festaj tagoj ni salutu la sanktejon de la bulgara scienco — la Sofian Universitaton „Kliment Oĥridski“. Gratulojn „Alma-mater“!

Atanas ILKOV



NOVA ESPERANTLINGVA PERIODAĴO

La nombro de esperantlingvaj periodaĵoj en la mondo pliiĝis per unu nova periodaĵo. Tiu ĉi periodaĵo estas la esperanta versio de la trimonata revuo „Litovio hodiaŭ“, eldonata de Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. La revuo aperas ankaŭ en la lingvoj rusa, franca kaj germana. La unua numero de la esperanta versio de la revuo estas numero 2 (29)/1987.

Ĝi estas belaspekta 96-paĝa kajero, formato 20×12.5 cm, aperigita de la Eldonejo „Mintis“, Vilnius, en eldonkvanto de 2 000 ekzempleroj. La tradukon el la litova lingvo en Esperanton faris Konstantinas Puodenas. La speciala redaktoro estas Peter Ĉeliauskas. Prezo de aparta numero: 45 koppejkoj.

La revuo prezentas per vortoj kaj bildoj (multkoloraj kaj nigrablankaj) panoramon de la vivo kaj atingiĝoj de Litova Soveta Socialisma Respubliko en konstruado de la socialismo.

La recenzata numero enhavas entute 20 materiaĵojn, respegulantaj diversajn sferojn de la vivo kaj laboro de litova popolo, ties pasintecan, kulturan kaj ligojn kun eksterlando. Jen iliaj titoloj: „Litovio — laŭ la vojo de Granda oktobra revolucio“ de Vytautas Sakalauskas, prezidanto de Ministra

Konsilio de Litova SSR, „Litovoj — partoprenintoj de Oktobra revolucio kaj Inter-civitana milito“, „Renkontiĝoj“ (pri la renkontiĝoj de Donatas Banionis en Danlando kaj FR Germanio), „Misio de amikeco“ (temas pri la gastado de litovaj artaj kolektivoj eksterlande), „Ŝiaulai kaj ŝeulejanoj“ (la artikolo estas, dediĉita al la historio kaj la nuntempo de urbo Ŝiauliai, la kvara urbo en la respubliko laŭ nombro de la loĝantoj — 137 000), „Laboroj de litovaj brutbredistoj“, „En astronomio — Vilniusa multkolora“ (la artikolo priskribas la aplikon de la vilniusa multkolora fotomateria sistemo por esplorado de la astroj), „Litova vitralo“, „Kanto de la kantoj“ (la materialo prezentas la jam tradician televidan konkurson de infanaj kaj lernantaj kantoj kaj kantado), „Litovaj ekslibrisoj“, „Trofeoj, akiritaj... per bastonoj“ (temas pri la atingoj de la virina gazonhokeo en Litovio), „La frataro de arboj“, „Lignaj ludiloj“, „Receptoj de litovaj manĝaĵoj“. Kaj jen ankaŭ beletraĵo — la rakonto „Veikiĝo antaŭvespere“ de Juozan Aputas kaj dupaĝa rubriko „Rido estas sano“, konsistanta el spiritaĵoj, karikaturoj. Kaj krome ankaŭ kelkaj priesperantaj materialoj „Centjariĝo de Esperanto“ de prof. L. A. Skupas, prezidanto de la Litova Filio de la Asocio de Sovetiaj Esperan-

tistoj, „Senlogikaj imitaĵoj el naciaj lingvoj“ de la konata litova esperantologo A. Vaitilavičius, „Revuo pri litova esperanta agado dum 1986“ kaj „Eksterlanda esperantista gazetaro pri ni“. Tiuj ĉi materialoj faras la revuon aparte allogan por la esperantistoj. Do larĝa gamo de temoj!

La numero estas riĉe ilustrita per altkvalitaj fotoj kaj presita sur bonkvalita papero.

Laŭenhave „Litovio hodiaŭ“ povas esti komparita kun la iama bulgara revuo „Nuntempa Bulgario“ kaj kun „Hungara Vivo“.

La traduko entute estas preskaŭ senripoĉa. La stilo — klara, zamenhofa. Mankas nenecesaj neologismoj. Eble la redakcio devas doni en ĉiu numero regulojn de transkribado de litovaj propraj nomoj en Esperanto.

Dimităr HAĜIEV

Heroaĵo sub bulgara nacia flago

La bulgara civitano Donĉo Papazov unua en la mondo ĉirkaŭis senhalte la Teron laŭ la plej malfacila itinero. „Kiam oni estas sur la marbordo, oni pensas pri la maro. Kiam oni estas en la maro, oni pensas pri la marbordo” — tiuj ĉi vortoj de Donĉo Papazov ĝuste difinas la filozofion de la marnavigisto. Konfirmo de liaj vortoj estas liaj agoj — jam 18 jarojn Papazov vivas maltrankvile sur la marbordo kaj ĉiam pli streĉe en la maro. En la taglibroj de la jaktoj, per kiuj li navigis, estas registritaj miloj da marmejloj laŭ diversaj itineroj kaj post sesjara restado sur la bordo la ŝipestro, de la jakto „Tivia” denove streĉis la velojn. Denove ĉirkaŭ la mondo, sed tiun, ĉi fojon sola, laŭ la plej malfacila itinero de la monda oceano...

Post kekljaraj elprovoj en la Nigra Maro Donĉo Papazov kaj lia edzino Julia Papazova unuaj inter la bulgaraj velŝipnavigantoj ĵetis provokon al la oceano. En 1974 dum 63 tagoj ili tranavigis per savboato Atlantikon — de Las Palmas ĝis Santiago de Kubo. Du jarojn poste, la 17-an de marto 1976 per la okmetra jakto „Ĝu” (nomita laŭ la karesa nomo de lia edzino Julia la geedzoj forlasis la havenon Callao (Peruo) kaj eknavigis tra la Pacifiko, por atingi la 3-an de aŭgusto de la sama jaro urbon Suvo — la ĉefurbon de la arkipelago Fiĝioj,

tranaviginte 14 mil kilometrojn. Sekvis la rondnavigado ĉirkaŭ Eŭropo kaj poste ankaŭ la plej longedaŭra kaj malfacila navigado de la familio Papazov, kiam sur la ferdeko de la jakto „Tivia” estis ankaŭ ilia sesjara filino Jana — la ĉirkaŭmonda navigado. Por la unua fojo jaktnavigantoj eknavigis ĉirkaŭ la Tero de bulgara haveno kaj revenis en ĝin. La starto okazis la 29-an de aprilo 1979 en Sozopol kaj la finalo — 14-an de junio 1981. En la daŭro de 777 tagoj familio Papazov tranavigis 42 160 marmejlojn (pli ol 60 000 kilometrojn).

La 11-an de julio 1987 „Tivia” forlasis urbon Sozopol kun Donĉo Papazov kaj Metodi Savov — unu el la herooj de Everesto, sur la ferdeko por atingi la bordojn de Argentino. Ili tranavigis 9 000 mejlojn, haltinte en kvar havenoj por ripari la jakton kaj por prepari ĝin por la solula ĉirkaŭmonda rondnavigado. Ĝi komenciĝis la 29-an de decembro 1987 ekde la ĉefurbo de Argentino Buenos Ajreso. La itinero de „Tivia” estis tre nekutima kaj ne estis trapasita de alia jaktnaviganto en la mondo sen halto, ĉar anticipe estis anoncote, ke „Tivia” navigos nur en la limoj de la 40- kaj 50-gradaj sudaj latitudoj kaj ĉe la ĉirkaŭado de la plej sudaj punktoj de Afriko, Aŭstralio kaj Suda Ameriko malsupreniĝos ankoraŭ pli suden. Ĝis antaŭnelonge tiu

ĉi vojo por la jaktnavigistoj en la mondo havis la difinon „malebla”. Sed jen la bulgara jaktnaviganto atingis la neatingeblan.

La malfacilaĵoj persekutis „Tivia” en ĉiuj punktoj de la sudaj paraleloj. Post kiam la 24-an de februaro la jakto registris sian plej altan ĝis tiam tagnoktan rapidecon — 195 marmejloj, sekvis serio da malagrablaĵoj. Unue ekpneis la motoro, rezulte de kio ankaŭ malintensiĝis la ŝargado de la akumulatoroj. Malfortiĝis ankaŭ la elektra kurento por la radiostacio, malgraŭ ke ĉiam ankoraŭ daŭrigas funkcii la sunbaterioj. Per kompleta ventumilekipaĵo „Tivia” duonigas la distancon en malpli ol tri monatoj kaj en marto ĝi jam estis preter Aŭstralio. La tempestoj jam estas ordinaraĵo por la marnaviganto, sed pro la malvarmo kaj la humideco lin komencis forte dolori la manoj. Ĝis kabo Horna restas ankoraŭ dumonata vojo, sed la jaktnaviganto trankviligas siajn samlandanojn pere de la radiostacio, ke li venkos la dolorojn. Sed venas ankaŭ la plej terura okazaĵo. La 16-an de aprilo „Tivia” trafas en kaptiteco de uragano kun forto de la vento de 60 nodoj (111 kilometroj pohore). Grandega faliganta ondo surŝutiĝas sur la pobon de la jakto kaj „Tivia” stariĝas kun la pruo supren. Pro la frapo la aŭtopiloto rompiĝas, du el la kovriloj de la deponejoj

estas forportitaj kaj la jakton enfluas akvo. La temperaturo de la aero estas ĉirkaŭ la nulo, sed Papazov vaĉas tagnokte. En tiu ĉi momento la kontaktoj kun la patrolando estas tute mallongaj, la

La bulgara jaktnaviganto kaj lia jakto „Tivia” eltenis. La 30-an de majo je la 13.15 laŭ G. M. T. Donĉo Papazov ĉirkaŭis kabon Horna — timigilon por homoj kaj ŝipoj ekde pratempoj ĝis nun, re-

vintra sezono — tra kobo Horna laŭ la 40-a paralelo”.

La unika navigado de „Tivia” daŭris plu al sia fina celo — la starta haveno Buenos Ajreso. La 13-an de ju-



Donĉo Papazov denove estas en Bulgario. La 6-an de julio 1988 — flughaveno „Sofio”. Maldekstre feliĉas Julia, dekstre — Jana. Al la legantoj de „BE” ni rememoru, ke Julia kaj Donĉo salutis ilin post sia tranavigado de Pacifiko en 1976. Tiam en n-ro 4/1977 la redakcio publikigis jenan tekston: „Al la legantoj de „Bulgara Esperantisto” ni bondeziras, ke ili neniam troviĝu en savboato kaj atingu mondon komunikigantan per Esperanto” (8.II.1977).

Por la interesantoj — la adreso de familio Papazov estas: str. „Bistrica” 7, Sofio.

Foto: Rosen TODOROV

voĉo de la jaktnaviganto estas mallaŭta kaj senforta, Novzelandaj radioamatoroj sciigas al siaj kolegoj el Bulgario, ke Donĉo Papazov troviĝas en mizerega situacio kaj ke ili atendas ĉiun momenton la malbonaŭguran sciigon „S. O. S.”, por ekalarmi...

gistrinte bonegan atingon ĉe la tranavigado de Pacifiko. Kelkajn tagojn poste al la patrolando alfluigis liaj vortoj, elsenditaj fare de la kapitano de la bulgara ŝipo „Fizalia”: „Mi estas fiera, ke mi realigis por la unua fojo navigadon laŭ la plej malfacila por velboato itinero dum

nio dum la nokto en la radioklubon de la Supera Maŝina-Elektroteknika Instituto „V. I. Lenin” (Sofio) alvenis nova ĝojiga novaĵo —

„Tivia” fermis la rondon ĉirkaŭ la Tero. „Mi faris ĝin! En tiu ĉi momento mi sentas min la plej feliĉa homo!” —

venas laŭ la efiro la voĉo de la marnaviganto.

Dum sia unika navigado (pli ol 33 000 kilometroj) Donĉo Papazov registris eksterordinarajn atingojn. Li tranavigis Atlantikon kaj

Hindian Oceanon resp. je 15 tagoj kaj je 4 tagoj pli rapide ol Vito Djuma, kiu same ĉirkaŭnavigis la Teron de Argentino ĝis Argentino en 1943, sed kun tri haltoj. Ĉe la tranavigo de Pacifiko la bulgara jaktnaviganto super-

pasis je tutaj 6 tagnoktoj la tempon de la unua ĉirkaŭmonda navigisto, kiu fermis la rondon ĉirkaŭ la Tero senhalte — la anglo Robin Nox.

Bojko KRĀSTEVIĆ

100 TAGOJN EN BULGARIO

DANG DINH DAM,
SEKRETARIO DE VPEA

(Daŭrigo de n-ro 7-8/88)

BOTEVGRAD

Ni atingis tiun urbon je la 16,30 h. Bonvenigis nin k-do Mitrofan Veleŭ, prezidanto de Societo „Trifon Ĥristovski“, k-ino Stamenka Bojkova kaj aliaj.

Antaŭ ol partopreni la Solenon de Centjariĝo de Esperanto je la 18.00 h. M. Veleŭ konsentis kun la iniciativo de s-ino Ĉenkova, per aŭto venigi nin al la vilaĝo Radotina, kie antaŭ 82 jaroj naskiĝis unu rimarkinda bulgaro-esperantisto, Trifon Ĥristovski.

Kompreneble, tiu vilaĝo jam tute ŝanĝiĝis, sed la domo de „tiu giganto de la homa spirito“ estas zorge konservita kiel muzeo kun ĝia

iama aspekto kaj ĉiuj liaj aĵoj.

Ni venis ĉi tien ĝuste kiam la lokaj gelernantoj estis en la korto, aŭskultantaj pri la vivo kaj revolucia agado de tiu komunisto-esperantisto, partia funkciulo kaj multjara sekretario de loka partia organizaĵo. La parolanto estas maljunulo, kiu sendube estas samtempulo kaj bone scias pri T. Ĥristovski. Varme bonvenigis nin la frato kaj la fratino de Trifon — Dimitar kaj Cveta Ĥristovski.

Ĉu tiu bonvenigo estas hazarda? Ne, tute ne! Ĉar, tuj post kiam ni alvenis Sofion, dank'al k-ino S. Ĉenkova, okupiĝanta pri Trifon Ĥristovski, mi havis renkontiĝojn kun la frato de Trifon, kiu sciante ke mi estas tradukanto de „Mia vivo“ en la

vjetnama lingvo, bonvolas akcepti nin ĉe li. Nu, hodiaŭ, nia atendata tago alvenis.

Ŝajnas, ke ĉi-vesperon la suno brilas pli longe por kune kun la mastroj bonvenigi la gastojn kun stelo verda en la koro kaj sur la brusto el tre fora lando Vjetnamio. Modesta kaj intima renkontiĝo ĉe la korto sunplena, kie Trifon iam ludis kaj sunbanis por plibonigi sian sanon. Mi sentas min forte emocia samkiel mi eklegis lian aŭtobiografion „Mia vivo“. Oni faris kun mi mallongan intervjuon rilatantan al mia tradukaĵo, kaj filmis la sporadajn minutojn, kiam mi elkore resumas miajn impresojn pri tiu vizito al la naskiĝdomo transformita en muzeon de la senmorta junulo-esperantisto en la vilaĝo Radotina. Ni kun respekto kaj amo

kliniĝas antaŭ la portreto de Trifon kaj post trarigardo de la domo, de la malgranda ĝardeneto, de la aĵoj de Trifon, oni regalis nin ĉiujn per tradicia menuo: pano kun mielo en simpla sed intima etoso.

La aŭtoĥupo rapidigis nin reveni al Botevgrad, kie la posteuloj de Trifon jam fondis Esperanto-societon post la venko super faŝismo en 1944. Fidela al la ekzemplo kaj volo de la elstara bulgara antifaŝisto-internaciisto, arda publicisto kaj esperantisto T. Ĥristovski, tiu E-societo bone disvolvas sian riĉan kaj varian agadon. Efektive, la atingiĝoj dum pli ol kvardek jaroj de la E-societo portanta la nomon „Trifon Ĥristovski” en Botevgrad estas rimarkitaj.

Nun, per plumo mi volas konigi al la legantaro de „Bulgara Esperantisto” mian laboron rilatanta al la „heroo” de la urbo Botevgrad, respondante al sciamo de la plejparto de la bulgaraj esperantistoj, kun kiuj ni havis okazon renkontiĝi dum nia restado en Bulgario.

Antaŭ ĉio, mi dankas al Esperanto, genia kaj benata kreaĵo de nia Majstro L. L. Zamenhof. Delonge, iu komparas ĝin kvazaŭ magian lampon de Aladino, kiu malfermas ĉiujn pordojn de la naciaj kulturoj. Reale, dum la cent jaroj pasintaj, la utilan rolon de Esperanto kiel ponto inter la kulturoj de tiu ĉi mondo oni ja prikantis kaj prikantus laŭ siaj propraj sperto, vivo, profesio... Kio koncernas min, mi volas pri-kanti ĝin laŭ la melodio de la famekonata Kieva verkistino Nadija Andrianova:

**„Ho mia kara lingvo Esperanto,
miraklo vera kaj neripe-
tebla,
ŝlosil’ magia, kiu malfer-
madas
de ĉiuj landoj, kontinen-
toj pordojn,
kaj same — de la bonaj
homoj korojn...”**

Pri la libro „Mia vivo”, oni ofte starigas al mi jenajn demandojn: Ĉu vi estas profesie tradukisto? Kial vi elektis tiun libron, kiam vi komencis traduki, kiam finis la laboron? Kia estas via impresoj pri tiu heroo?...

Ha! Interesaj demandoj! Kaj jen la simplaj kaj sinceraj respondoj:

Mi eklernis Esperanton en 1958, enoficiĝis kiel kadrulo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) en 1964, kiel sekretario laboras de 1985 kaj havas multajn geamikojn en eksterlando. En la jaro 1985 mi ricevis de mia bulgara korespondantino pakajon kun Esperanto-libroj, inter kiuj estas la libro „Mia vivo” de Trifon Ĥristovski. Mia amikino estas Sonja Tiĥova, instruistino en Gabrovo, kie ĵus gastis ĉe ŝi.

La libro, kun blanka kovrilo kaj kun la portreto de la aŭtoro, allogas min la tuja legado. Mi atente legis ĝin. Mia emocio fariĝis pli kaj pli granda post ĉiu paĝo, post ĉiu ĉapitro. Per sincera kaj senornama maniero la aŭtoro bildigis antaŭ mi la homon, kiu spite al sia sorto neordinare drameca, strebas fariĝi utila, ekzempla kaj instrua. Ĝuste kiel Nikola Aleksiev, la tradukinto en Esperanton de tiu ĉi libro, diras: „tre rara kaj interesa fenomeno en la membiografia

literaturo...” La antaŭparolo de la E-tradukinto trafe prezentante la esencan enhavon de la libro, tiel allogis min, ke mi tuj decidis traduki ĝin en la vjetnaman lingvon. En la komenco de la jaro 1986, mi prove tradukis kelkajn unuajn ĉapitrojn, kiuj tre plaĉis al miaj geamikoj-esperantistoj en Hanojo kaj en urbo Ho Chi Minh.

Junie de 1986, akceptante la MEM-delegacion, en kiu estis reprezentantoj de BEA, mi informis ilin, ke mi havas ideon traduki la libron „Mia vivo” en la vjetnaman. La gastoj estis tre ĝojaj, gratulante mian bonan ideon. Ili kuraĝigis min kaj bondeziris al mi sukceson. Speciale k-do Clément Tholet, Ĝenerala Sekretario de MEM, tiumomente donacis al mi la libron en la franca versio, inter ties tradukintoj estas li mem. Tio estas bona konsultaĵo por mia laboro. Cetere, la subteno de nia estimata kaj kara poeto Dao Anh Kha, kiel kuntradukinto estas garantio por la sukcesa kaj fidinda manuskripto.

Kvankam tre okupata pro diversaj taskoj de sekretario, de kunlaboranto de la Hanoja Fremdlingva Eldonejo en la E-eldonado, de E-instruado, ktp... mi laŭ la ekzemplo de Trifon Ĥristovski, plenforte laboris kaj tradukis ĉapitron post ĉapitro, kaj tuj transdonis ĝin al k-do Dao Anh Kha por revizio. De bona revizio mi tajpis tri ekzemplerojn kaj transdonis unu al mia amiko Hong Hac pentristo-esperantisto, kiu bonvolonte legis kaj kontribuis por la libro siajn du ilustraĵojn. Tiuj ilustraĵoj plaĉis al ĉiuj, kiuj vidis ilin, precipe al k-dino S. Ĉenkova

kaj la frato de la aŭtoro.

La ses lastajn ĉapitrojn mi fintradukis en IEK-Pisanica en majo de 1987. Dume mia kolego Thu tajpis zorge kiel ekzempleron taŭgan por presigo.

Mi elektis tiun libron por mia unua traduko en la vjetnaman lingvon, ĉar enhavo vere skuis mian animon, elmontris mirindan ekzemplon de „la venkinto de sia destino“ venki ĉiujn malfacilaĵojn por fari sin „heroo“. La dua motivo mia kuŝas en tio, ke la aŭtoro estis esperantisto, kiu frue kaj bone utiligis nian internacian lingvon por sia revolucia celo „ruĝa kaj verda“ en la iama regiono de Orĥanie (hodiaŭ Botevgrad) kun ĝia neimagebla malriĉeco kaj postrestiteco. Dank'al Esperanto la heroaĵoj de T. Ĥristovski estas monds-kale konataj. Dank'al Esperanto, k-do Nikola Aleksiev dissemas la libron „Mia vivo“ al multaj landoj proksimaj kaj malproksimaj kaj dank'al Esperanto mi proponas ĝin al la vjetnamaj legantoj, precipe al la junuloj, kiuj heredos la ardan flamon „ruĝan kaj verdan“ de tiu senmorta aŭtoro.

Mi tute kredas, ke la arda patrioto kaj internaciisto-esperantisto Trifon Ĥristovski ĉiam vivos en la koroj de la progresemaĵoj kaj esperantistaro, kiuj sindone kaj senlace batalas por sia sendependeco, libero, daŭra paco kaj sociala progreso. Tiusence, nia traduka laboro estas modesta kontribuo al la disvastigo de bulgara kulturo al la vjetnama legantaro pere de la „unika aŭtobiografio“ en tre valora Esperanta versio kaj samtempe

ĝi estas konkreta pruvo pri la rolo de lingvoponto-Esperanto okaze de ĝia signifoplena centjariĝo.

Vere feliĉa kaj fiera estas tiuj, kiuj havis kaj havas la bonan okazon viziti la Domo-muzeon de T. Ĥristovski, kies volo, vireco, obstino kaj sciamo servas kiel ekzemplo imitinda por la juna generacio de Botevgrada regiono. La loka E-societo des pli fieras pri lia nomo antaŭ la sojlo de la dua jarcento de Esperanto.

Mallongan tempon ni restis en Botevgrad, tamen ĝiaj homoj kaj beleco restos ĉiam en nia koro. Tio estas facile komprenebla, ĉar ĉi tie, nur kelkajn monatojn post kiam Trifon Ĥristovski forpasis, la lokaj loĝantaro kaj esperantistaro kune kun la tuta bulgara popolo, ĝuis la feliĉan novan vivon pri kiu Trifon tutkore servis kaj ĝismorte sopiris.

Estas io, kio instigas min skribi ĉi-subajn liniojn, kiuj nuance esprimas mian dankon al ĉiuj bulgaraj geamikoj bonkoraj, amplenaj.

Unuan fojon en mia vivo, la poetino-gastiganto sidante apud mi ĉe festena tablo skribe dediĉis al mi sian poemon jene:

**Mi ne volas vin demandi
kial amas vi alian,
kial via amo granda
vaporiĝis en nenion.**

**Mi ne volas vin demandi —
senti ree la turmenton.**

Ŝlosos mi en mia koro

herbon, flustron kaj silenton.

Restas unu nur espero —

**veni en la sonĝoj oraj.
Tie nure vin karesi,
ĉar mi amas vin ankoraŭ.**

*Botevgrad, la 11-an de junio
1987
21, 15 h*

Kiel romantike!

Bedaŭrinde mi ne estas poeto por repliki ŝin poeme. Tamen mi tre ŝatas lirikajn poemojn, kaj parkeras plurajn, kiaj „Vi kaj Ci“ de iu Kazaka poeto; „Al Etelke“ de Sandor Petofi; „Al Anna Kern“ de A. Puŝkin, ktp... Tial, la supra poemo tre plaĉas al mi, kaj estas des pli valora, ĉar ĝia enhavo kaj dediĉa tempo ampleksas la vastan signifon de internaciista amo, bela kaj sincera, rememorigante min pri la amo de T. Ĥristovski al iuj botevgradaj bonkoraj fraŭlinoj, priskribita en „Mia vivo“.

Jes ja! La amo plej bela estas en „sonĝoj oraj“!

* * *


Ĉi-foje revenante Sofion, ni kun refreŝigita animo bonvenigas la plej grandan feston, organizatan de BEA en la salonego de la Nacia Palaco de Kulturo matene de la 13-a de junio 1987, por solene celebri du gravajn jubileojn — la 100-jariĝon de la internacia lingvo Esperanto kaj 80-jariĝon de Bulgara Esperantista Asocio.

Kia feliĉo por mi troviĝi en tia soleno ĉe la fama Nacia Palaco de Kulturo en Sofio, en kiu reprezentiĝas pli ol 500 aktivaj esperantistoj el ĉiuj partoj de Bulgario por revui kaj ĝui la centjariĝon de Esperanto kaj la 80-jaran jubileon de BEA kies signi-

fon bonargumente prezentis Nikola Aleksiev kaj en sia festa parolado prof. D-ro Stojan Ĝuĝev.

Mi pliprofunde komprenis la forton de tiu „Bastiono de Esperanto” kiel oni nomas Bulgarion, bazanta sin sur la grandaj apogoj — de la plej altaj ŝtataj gvidantoj ĝis diversaj amasorganizaĵoj.

Mi ankaŭ ĝuis la emocian momenton de la dekorado per la jubilea medalo al pli ol 30 bulgaraj esperantistoj-veteranoj kaj aktivuloj, inter kiuj unuavice k-do Sava Dălbokov — unua vicprezidanto de la Patrolanda Fronto, kaj kiel gastoj, ni kun granda honoro kaj fiero akceptis tiun noblan rememoraĵon simbolantan la bonan amikecon kaj kunlaboron inter la vjetnama kaj bulgara esperantistaro. Kompreneble, mi ne povas reteni min en feliĉa silento, kaj oni permesis al mi fari salutparolon kaj perkantan dankesprimon antaŭ tiom da bulgaraj geamikoj konataj kaj nekonataj. Por mi nun tiuj vortoj kvazaŭ sonas harmonie kun la aplaŭdoj post ĉiufojo, kiam mallaŭtiĝas mia voĉo tra la vjetnama popolkanto dediĉita al niaj karaj esperantistoj en Budapeŝto, en Viŝegrado (1979); en Erevano, en Moskvo (1982), en Smoljan (1985), en Sofio kaj pluraj urboj de Bulgario (1987). Ĉu tiu kanto „Trans la ponto” fariĝis „Mia kanto”, kiu ne nur plaĉis al miaj geamikoj eksterlandaj, sed ankaŭ kiel verda fadeno ligas mian koron kun tiuj de la aŭskultintoj. Tio pensigas min, se tempo permesas, mi skribos pri tiu kanto kiel historieto de mia esperantista vivo.



Memoro de la IV Internacia Infana Asambleo “Standardo de la Paco” — Sofio’88

Foto: Silva ZAKARJAN



Dezir korespondi

BULGARIO

IVANIČKA DOBREVA SAVOVA (38-jara) — ul. Jurij Gagarin 39, 5100 Gorna Orjaŝovica pri ĉt kun ĉl.

LIDIA MILOŠEVA (31-jara, fraŭlino) — ul. Kolarovska 9, 1113 Sofio, pri ĉt. Kolektas BK kaj PM.

DIANA SLAVEVA (18-jara) — 2260 Svoge, kv. Drenov, Sofia obl., str. Sredna gora 47, pri ĉt kun ĉl.

SVISLANDO

RETO ROGANTINI (37-jara) Via Sent 2, 7500 st. Moriz — pri ĉt kun ĉl. Kolektas PM.

RUMANIO

AKOS NAGY — 4193 Ulies, str. Principala Nr. 50 Jud. Harghita — pri rock-muziko kaj interŝanĝo de diskoj kun bulgaroj.

POLLANDO

JERZY SKORZEWSKI (37-jara, juristo), ul. Uoninska 10, 62—560 Skulsk, pri ĉt kun ĉl. Kolektas BK kaj PM.

KINGA STRUGALA (13-jara) — Os. Sloneczne, ul. Jasna 9a/13, 57—200 Labkowice Sl. — pri muziko, literaturo, sporto, turismo kun ĉl.

SOVETUNIO

RIMA SAMARDOKAITE (16-jara) — LJSR 30-ĉio 27—61, 235000 Jonava, Litovio — pri muziko, literaturo kun ĉl.

SEP GEJUNULOJ (19-25-jaraj) deziras kor. kun ĉl. pri ĉt. Komuna adreso: Gintaras Ziaunys, P. O. Box 422, 232004 Vilnius, Lithuania, SU

VLADIMIR KREMSKIJ (30-jara) — 281900 — SU Ukrainio, u. Kamanec-Podolskij, ĉefpoŝto, a/k N 3 — pri historio, literaturo, turismo kun ĉl.

ELINA LUNJOVA (21-jara) — Do vostrebovanija, SU—410054, Saratov—54, pri ĉt kun ĉt.

GRUPO GEESPERANTISTOJ (13—60-jaraj) dez. kor. pri ĉt kun ĉl. Komuna adreso: Litovio USSR, 235000 Jonava, a. k. 7, Esperanto-klubo „Tondro“

NI KONDOLENCAS

Forpasis la eminenta kaj sindonada aktivulo de la Esperantomovado en Ĉepelare, la membro de CE de BEA Dimităr Stojanov Marev.

Li naskiĝis kaj vivis en la bela Rodopa urbeto Ĉepelare. Lia patro, Stojan Marev, kreinta en 1926 la unuan E-societon en la meza parto de Rodopi-montaro, transdonis al sia filo la amon al Esperanto.

En 1966 Dimităr Marev restarigis la societon, kiu baldaŭ okupis indan lokon inter la unuaj en la lando. Dank' al lia organiza talento la societa membraro plimultiĝas, stabiligas ĝia materiala bazo, kreskas ĝia aŭtoritato.

Multjara prezidanto de nia E-societo „Diĉo Petrov“, lektoro en la kursoj de Esperanto, gvidanto de la amatora artagado, pentristo, korespondanto, organizanto de kulturaj iniciatoj, Marev senlace fordonis sin al la Movado.

Liaj plej fidelaj adeptoj fariĝis indaj daŭrigantoj de lia fardo. Ne silentiĝos la E-parolo en Ĉepelare! Ĝi estos lia plej bona monumento, memorigos pri lia amo al la homoj, pri lia strebado al frateco kaj paco inter la popoloj.

E-societo „Diĉo Petrov“, Ĉepelare

* * *

La 12-an de aprilo 1988 mortis en Sofio Hristo Karaneŝev (71-jara). Li estis en junaĝo prezidanto de la Junulara Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio kaj gvidanto de la Unua Internacia Esperanto-Laborbrigado en Bulgario (1947).

Ĝis la lasta tago de sia vivo, samideano Karaneŝev estis entuziasma, fidela kaj modesta esperantisto, ne nur per vortoj, sed precipe per agado en la movado.

Niajn kondolencojn al liaj edzino kaj filino.

BEA

* * *

La 27-an de majo ĉi-jare forpasis en Ateno la 80-jara Georgios (Georgo) Migas (1908—1988), Honora Prezidanto de Helena E-Asocio, longjara Komitatano kaj Ĉefdelegito de UEA por Greklando.


Eminenta, fervora kaj sinofera esperantisto, granda amiko de la bulgara popolo, li estis unu el la pioniroj de la greka E-movado, dum multaj jaroj Vicprezidanto kaj poste Prezidanto de Helena E-Asocio (ĝia Honora Prezidanto ekde 24.03.1986) kaj ofte li lasis flanken sian profesion por eluzi sian tutan tempon favore al Esperanto.

La greka esperantistaro longe funebros kaj neniam forgesos lin.

Helena E-Asocio

ABONU KAJ ABONIGU REVUON

Bulgara Esperantisto



Ĉu vi jam abonis revuon „Bulgara Esperantisto” por 1988? Se vi feriiis aŭ ne sukcesis fari tion pro aliaj kaŭzoj vi ankoraŭ havas tempon. Sed ne prokrastu! Iru al via poŝtejo kaj certigu al vi tutjaran regulan ricevadon de nia revuo! Ne preterlasu aboni la organon de Bulgara Esperantista Asocio ankaŭ por viaj eksterlandaj amikoj.

● Per la regulaj paĝoj vi festos kune kun ni la 70-jariĝon de „Bulgara Esperantisto” — unu el la plej malnovaj E-periodaĵoj en la mondo!

● En nia revuo vi trovos interesajn por ĉiu aĝo legaĵojn.

● Legante la revuon, vi ekscios multe da E-novaj, informigos pri diversaj aspektoj de la movado kaj ĝuos agrablajn minutojn kun nia „Distra paĝo”.

● Vi trovos vian preferan rubrikon: Lingvaj demandoj, Esperanto en profesioj, Originala verkaro, Leteroj de korespondamikoj, Juna Esperantisto, Verdaj Steletoj, Deziras korespondi...

● Vi ĝuos pli belaspektan kaj luksan eldonon!

„Bulgara Esperantisto” estas abonebla per la poŝto ankaŭ en ĉiuj socialismaj landoj. Alilandanoj, kiuj deziras aboni nian revuon, bonvolu sendi la abonkotizon laŭ la konto de Bulgara Esperantista Asocio ĉe Centra Oficejo de UEA, en Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO.

Ĉi-sube ni proponas al via atento ankaŭ la nomaron de niaj eksterlandaj perantoj:

BRITIO: S-ro Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby Grimsby, South Humbertide DN 365RT.

FRG: S-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, D—6738 Elmstein.

FRANCIO: S-ro Gilbert Gerrier, Esperantista Federacio de Laboro, 179, rue Ordener, 75018 Paris; tel. 252 19 36.

HISPANIO: S-ro Adonis Gonzales Meana, str. Marcelino Gonzalez 5—4. D. Gijon — 9 (Asturias), tel. (985) 15 15 34. Por leteroj kaj korespondadoj: Apartado 242 33 280 Gijon — Asturias.

JAPANIO: S-ro Yoahiaki Mizuo, 327, Kitairiso, Sayamasci, Saitamaken 350—13.

Ĉiu deziranto estiĝi peranto de „Bulgara Esperantisto” en landoj, kie la revuo ne havas reprezentantojn — estos afable akceptita.




Bonnajbareco ĉe arboj

Pri tio rememorigas ankoraŭfoje la malgranda miksarbareto apud urbo Minsk. Sciencistoj el la Botanika Eksperimenta Stacio ĉe la Belorusa Sciencakademio, kiuj okupiĝis pri observado de tiu arbaro, raportis la rezultojn de sia dudekjara laboro.

Tie ĉi kune kreskas samaĝaj betuloj, kverkoj, tilioj, pinoj kaj piceoj. Sed dum la kronoj de iuj el la arboj altiĝas ĉielen, aliaj estas nur iom pli altaj ol arbustoj.

Evidentiĝis, ke la malegala elkreskado de la dudekjaraj arboj estas rezulto de konvena aŭ malkonvena najbareco. La optimuma proporcio de la arbospecoj en miksarbaro estas: 75% da kverko kaj 25% da tilio, aŭ 90% da pino kaj 10% da piceo. Tiuj ĉi arboj ne hazarde kamaradas unuj kun la aliaj. Ekzemple, en junio la kverko ensorbas multe da fosforo kaj la tilio ĝuste tiam eligas ĝin en la grundon. En julio la bezonoj de la kverko malpliĝas, sed finiĝas la dieto de la tilio kaj la najbaro dividas siajn rezervojn.

AMUZA ZODIAKO



PESILO
(23.09—22.10)

*Ĉiam la Pesiloj ŝanceliĝas —
ili diras „jes“ kaj tuj ekpentas.
Tie diplomata ar' naskiĝas,
sed iuloj fuŝas, akradentas.*

*Aliuloj sin ornamu ŝatas,
nur en novaj vestoj ili esti ŝatas.
Se ekeblo — tricent vestoparoj
ilin akompanos en la tombo!*

*Estas ofte viglaj, koketemaj,
laŭnature — saĝaj, taktoplenaj.
„L'oran mezon“ amas en printemp', somero,
dum aŭtun', ĝis vintra malapero...*

*Kaptas ilin ambiciaj emoj,
ties tagoj ja — fabelpoemoj!
Havas volon, se nur ekdeziras...
sed per peto ĉion supreniras.*

*De naskiĝo ili justaj estas,
komplezemas, mildas kaj honestas.
ĉarmaj estas, ĉiam ridetantaj.
ĝenerale — bonaj, konsentantaj.*

*Ili tro sin gardu kontraŭ ŝafoj,
kiuj pretas por kornpikaj trafoj.*

Esperantigis: Asen JOSIFOV

